

PERSONNAGES

MONSIEUR LEPIC

POIL DE CAROTTE

MADAME LEPIC

ANNETTE

*La scène se passe à une heure de l'après-midi,
dans un village de la Nièvre.*

PERSONOJ

SINJORO LEPIKO

KAROTKAPO

SINJORINO LEPIKO

ANNETO

*La sceno okazas je la unua posttagmeze,
en vilaĝo el la Nievro.*

Poil de Carotte

Une cour bien « meublée », entretenue par Poil de Carotte. À droite, un tas de fagots rangés par Poil de Carotte. Une grosse bûche où Poil de Carotte a l'habitude de s'asseoir. Une brouette et une pioche.

Derrière le tas de fagots, en perspective jusqu'au fond de la cour, une grange et des petits « toits », toit des poules, toit des lapins, toit du chien. — C'est dans la grange que Poil de Carotte passe le meilleur de ses vacances, par les mauvais temps.

Un arbre au milieu de la cour, un banc circulaire au pied de l'arbre.

À gauche, la maison des Lepic, vieille maison à mine de prison. Un rez-de chaussée surélevé. Murs presque aussi larges que hauts.

Au premier plan, l'escalier. Six marches et deux rampes de fer. Porte alourdie de clous. Marteau.

Une culotte de chasseur, garnie de boue, est accrochée au mur.

Au deuxième plan, une fenêtre avec des barreaux et des volets, d'où Mme Lepic surveille d'ordinaire Poil de Carotte. Un puits formant niche dans le mur.

Au fond, à gauche, une porte pleine dans un pan de mur. C'est par cette porte qu'entre et sort le monde, librement. Pas de sonnette. Un loquet.

Au fond, à droite, une grille pour les voitures, puis la rue et la campagne, un clair paysage de septembre : noyers, prés, meules, une ferme.

Karotkapo

Bone « meblita » korto, prizorgita de Karotkapo. Dekstre, amaso de branĉfaskoj aranĝitaj de Karotkapo. Ŝtipego kie Karotkapo kutimas sidi. Ĉarumo kaj pioĉo.

Malantaŭ la amaso de branĉfaskoj, perspektive ĝis fundo de la korto, garbejo kaj malgrandaj « tegmentoj », tegmento por kokinoj, tegmento por kunikloj, tegmento por la hundo. — En la garbejo Karotkapo pasigas la plejparton de siaj ferioj, en malbelaj veteroj.

Arbo meze de la korto, cirkla benko piede del' arbo.

Maldekstre, la domo de ge-Lepikoj, malnova domo kiu mienas kiel malliberejo. Plialtigita teretaĝo. Muroj preskaŭ tiel larĝaj kiel altaj.

Sur la unua plano, la ŝtuparo. Ses ŝtupoj kaj du feraj manreloj.

Najlpezigita pordo. Frapilo.

Ĉasista pantaloneto, garnita de koto, estas al kroĉita ĉe la muro.

Sur la dua plano, kradfenestro kaj ŝutroj, de kie s-ino Lepiko kutimas observi Karotkapon. Akvoputo formanta niĉon en la muro.

Funde, maldekstre, plena pordo en murfaco.

Tra tiu pordo personoj eniras kaj eliras libere.

Sen sonorilo. Klinko.

Funde, dekstre, kradportalo por veturiloj, poste strato kaj kamparo, hela septembra pejzaĝo : juglandarboj, herbejoj, fojnostakoj, farmobieno.

SCÈNE PREMIÈRE : POIL DE CAROTTE, MONSIEUR LEPIC

Poil de Carotte, nu-tête, est habillé maigrement. Il use les effets que son frère Félix a déjà usés. — Une blouse noire, une ceinture de cuir noir avec l'écusson jaune des collégiens, un pantalon de toile grise trop court, des chaussons de lisière; pas de cravate à son col de chemise étroit et mou. Cheveux souples comme paille et couleur de la paille quand elle a passé l'hiver dehors, en meule.

M. Lepic : veston et culotte de velours, chemise blanche de « Monsieur » empesée et un gilet, pas de cravate non plus, une chaîne de montre en or. Un large chapeau de paille, des galoches, puis des souliers de chasse.

Au lever du rideau, Poil de Carotte, au fond, donne de l'herbe à ses lapins. Il vient au premier plan couper avec une pioche les herbes de la cour. Il pioche, plein d'ennui, près de sa brouette. — M. Lepic ouvre la porte et paraît sur la première marche de l'escalier, un journal à la main. En entendant ouvrir la porte, Poil de Carotte a peur. Il a toujours peur.

MONSIEUR LEPIC

À qui le tour de venir à la chasse ?

POIL DE CAROTTE

C'est à moi.

MONSIEUR LEPIC

Tu es sûr ?

POIL DE CAROTTE

Oui, papa, tu as emmené mon frère Félix la dernière fois, et il vient de sortir avec ma mère qui allait chez

UNUA SCENO : KAROTKAPO, SINJORO LEPIKO

Karotkapo, kapnuda, estas vestita malabunde. Li trivas vestojn kiujn sia frato Felikso jam trivis. — Nigra kitelo, zono el nigra ledo kun gimnazia flava ŝildeto, tro mallonga pantolono el griza tolo, hejmaj ŝuoj; sen kravato al sia mallarĝa mola kolumo de ĉemizo. Haroj flekseblaj kiel pajlo kaj koloraj kiel pajlo kiu ekstere trapasis vintron, stake.

S-ro Lepiko: jako kaj pantaloneto el veluro, blanka amelita ĉemizo de « Sinjoro » kaj veŝto, ankaŭ sen kravato, ora poŝhorloĝoĉeno. Larĝa ĉapelo el pajlo, galoŝoj, poste ĉasaj ŝuoj.

Je kurtenlevo, Karotkapo, malantaŭe, donas herbon al siaj kunikloj.

Li venas antaŭen pioĉi herbojn de la korto. Li pioĉas, plena de enuo, apud sia ĉarumo. — S-ro Lepiko malfermas la pordon kaj aperas sur la unua ŝtupo, kun gazeto en la mano. Aŭdante la malfermiĝantan pordon, Karotkapo timas. Li ĉiam timas.

SINJORO LEPIKO

Kies vico estas por veni ĉasi?

KAROTKAPO

Mia vico.

SINJORO LEPIKO

Ĉu vi certas?

KAROTKAPO

Jes, paĉjo, vi iris lastfoje kun mia frato Felikso, kaj li ĵus eliris kun mia patrino kiu foriris ĉe

Monsieur le curé. Il a emporté ses lignes : il pêchera toute la soirée, au moulin.

MONSIEUR LEPIC

Et toi, que fais-tu là ?

POIL DE CAROTTE

Je désherbe la cour.

MONSIEUR LEPIC

Tout de suite après déjeuner ? C'est mauvais pour la digestion.

POIL DE CAROTTE

Ma mère dit que c'est excellent. *Il jette la pioche.* Par-tous-nous ?

MONSIEUR LEPIC

Oh ! pas si vite. Le soleil est encore trop chaud. Je vais lire le journal et me reposer.

POIL DE CAROTTE, avec regret.

Comme tu voudras. *Il ramasse sa pioche.* C'est sûr que nous irons ?

MONSIEUR LEPIC

À moins qu'il ne pleuve.

Sinjoron pastron. Li kunprenis siajn hokfadenojn : li fiŝhokos la tutan vesperon, ĉe la muelejo.

SINJORO LEPIKO

Kaj vi, kion vi faras nun?

KAROTKAPO

Mi senherbigas la korton.

SINJORO LEPIKO

Tuj post la meztagmanĝo? Tio malbonigas la digeston.

KAROTKAPO

Mia patrino diras, ke tio esta bonega. *Li ĵetas la pioĉon.* Ĉu ni foriros?

SINJORO LEPIKO

Ho! Ne tiel rapide. La suno estas ankoraŭ tro varma. Mi tuj legos ĵurnalon kaj ripozos.

KAROTKAPO, *bedaŭre*

Kiel vi deziras. *Li reprenas sian pioĉon.* Ĉu certe ni iros?

SINJORO LEPIKO

Escepte se pluvos.

POIL DE CAROTTE, regardant le ciel.

Ce n'est pas la pluie que je crains... Tu ne partiras pas sans moi ?

MONSIEUR LEPIC

Tu n'as qu'à rester là. Je te prendrai.

POIL DE CAROTTE

Je suis prêt. Je n'ai que ma casquette et mes souliers à mettre... Et si tu sors par le jardin ?...

MONSIEUR LEPIC

Tu m'entendras siffler le chien.

POIL DE CAROTTE

Tu me siffleras aussi ?

MONSIEUR LEPIC

Sois tranquille.

POIL DE CAROTTE

Merci, papa. Je porterai la carnassière.

MONSIEUR LEPIC

Je te la prête. J'ai assez de mon fusil.

POIL DE CAROTTE

Moi, je prendrai un bâton pour taper sur les haies et

KAROTKAPO, *rigardante la ĉielon.*

Pluvon mi ne timas... Vi ne foriros sen mi, ĉu ne?

SINJORO LEPIKO

Nur restu tie. Mi iros kun vi.

KAROTKAPO

Mi estas preta. Mi nur metu mian kaskedon kaj ŝuojn... Kaj se vi eliros tra la ĝardeno, ĉu...?

SINJORO LEPIKO

Vi aŭdos min, fajfi por la hundo.

KAROTKAPO

Vi ankaŭ fajfos por mi, ĉu ne?

SINJORO LEPIKO

Trankviliĝu.

KAROTKAPO

Dankon, paĉjo. Mi portos la ĉasaĵsakon.

SINJORO LEPIKO

Mi pruntas ĝin al vi. Al mi sufiĉas mia fusilo.

KAROTKAPO

Mi, mi prenos bastonon por frapi heĝojn kaj

faire partir les lièvres. À tout à l'heure, papa. En t'attendant, je désherbe ce coin-là.

MONSIEUR LEPIC

Ça t'amuse ?

POIL DE CAROTTE

Ça ne m'ennuie pas. C'est fatigant au soleil, mais à l'ombre, ça pioche tout seul. — D'ailleurs, ma mère me l'a commandé.

M. Lepic le regarde donner quelques coups de pioche et rentre.

SCÈNE II : POIL DE CAROTTE, seul.

Par précaution, je vais renfermer le chien qui dort. Il ferme la porte d'un des petits toits. De cette façon M. Lepic ne peut pas m'oublier, car il ne peut pas aller à la chasse sans le chien et le chien ne peut pas aller à la chasse sans moi.

Un bruit de loquet à la porte de la cour. Poil de Carotte croit que c'est Mme Lepic et se remet à piocher.

SCÈNE III : POIL DE CAROTTE, ANNETTE

Une paysanne pousse la porte et entre dans la cour. Elle regarde Poil de Carotte qui tourne le dos et pioche avec ardeur. Elle traverse la cour, monte l'escalier et frappe à la porte de la maison. Poil de

pele leporojn. Ĝis tuj, paĉjo. Atendante vin, mi senherbigas ĉi tiun lokon.

SINJORO LEPIKO

Ĉu tio amuzas vin?

KAROTKAPO

Tio ne tedas min. Sub la suno, tio lacigas, sed en la ombro, pioĉado glatas. — Plie, mia patrino ordonis ĝin al mi.

S-ro Lepiko rigardas lin doni kelkajn pioĉfrapojn kaj reeniras.

DUA SCENO : KAROTKAPO, sola.

Antaŭzorge, mi tuj enŝlosos la dormantan hundon. *Li fermas la pordon de unu el la malgrandaj tegmentoj.* Tiel s-ro Lepiko ne povas forgesi min, ĉar li ne povas iri ĉasi sen la hundo kaj la hundo ne povas iri ĉasi sen mi.

Klinkobruo ĉe la kortopordo. Karoto-kapo pensas ke tio estas s-ino Lepiko kaj pioĉadas denove.

TRIA SCENO : KAROTKAPO, ANNETO.

Kampanino puŝas la pordon kaj eniras la korton. Ŝi rigardis Karotkapon kiu dorse pioĉas arde. Ŝi trairas la korton, supreniras la ŝtuparon kaj frapas ĉe la dompordo.

Carotte, étonné que Madame Lepic passe sans rien lui dire de désagréable, risque un œil et se redresse.

POIL DE CAROTTE

Tiens, ce n'est pas Madame Lepic. — Qui demandez-vous...
Mademoiselle ?

ANNETTE

Sans caractère conventionnel, elle est habillée comme une paysanne qui a mis ce qu'elle a de mieux pour se présenter chez ses nouveaux maîtres. Bonnet blanc, caraco noir, jupe grise, panier au bras.

Madame Lepic.

POIL DE CAROTTE, sans lâcher sa pioche.

Elle est sortie.

ANNETTE

Va-t-elle rentrer bientôt ?

POIL DE CAROTTE

J'espère que oui. — Que désirez-vous ?

ANNETTE

Je suis la nouvelle servante que Madame Lepic a louée jeudi dernier à Lormes.

POIL DE CAROTTE, important, lâche sa pioche.

Je sais. Elle m'avait prévenu. Je vous attendais d'un jour à l'autre. Madame Lepic est chez Monsieur le

S-ino Lepiko pasas, ne dirante malagradablaĵon; mirigita, Karotkapo riskas ekrigardon kaj ekstaras.

KAROTKAPO

Ha! ne estas s-ino Lepiko. — Kiun vi petas... Fraŭlino?

ANNETO

Mallaŭ sia kondiĉo, ŝi estas vestita kiel kamparanino kiu surmetis siajn plej belajn vestojn por prezentiĝi ĉe siaj novaj gemastroj. Blankan kufon, nigran korsafon, grizan jupon, korbon ĉe la brako.

Sinjorinon Lepikon.

KAROTKAPO, ne lasante sian pioĉon.

Ŝi eliris.

ANNETO

Ĉu ŝi baldaŭ rehejmiĝos?

KAROTKAPO

Mi esperas ke jes. — Kion vi deziras?

ANNETO

Mi estas la nova servistino kiun sinjorino Lepiko dungis lastjauĉe en Lormo.

KAROTKAPO, grava, lasas sian pioĉon.

Mi scias. Ŝi avertis min. Mi atendis vin en ĉi tiuj tagoj. Sinjorino Lepiko estas ĉe sinjoro

curé. Inutile d'entrer à la maison. Il n'y a personne que Monsieur Lepic qui fait sa sieste et qui n'aime guère qu'on le dérange. Du reste, la servante ne le regarde pas. — Asseyez-vous sur l'escalier.

ANNETTE

Je ne suis pas fatiguée.

POIL DE CAROTTE

Vous venez de loin ?

ANNETTE

De Lormes. C'est mon pays.

POIL DE CAROTTE

Et votre malle ?

ANNETTE

Je l'ai laissée à la gare.

POIL DE CAROTTE

Est-elle lourde ?

ANNETTE

Il n'y a que mes nippes dedans.

POIL DE CAROTTE

Je dirai au facteur de l'apporter demain matin, dans sa voiture à âne. Vous avez votre bulletin ?

pastro. Ne utilas eniri la domon. Nur estas sinjoro Lepiko kiu siestas kaj ne ŝatas esti ĝenata. Plie, la servistino ne koncernas lin. — Sidiĝu sur la ŝtuparon.

ANNETO

Mi ne estas laca.

KAROTKAPO

Ĉu vi venas de malproksime?

ANNETO

De Lormo. Tiu estas mia vilaĝo.

KAROTKAPO

Kaj via kofro?

ANNETO

Mi lasis ĝin en la stacidomo.

KAROTKAPO

Ĉu ĝi estas peza?

ANNETO

En ĝi nur estas miaj vestaĉoj.

KAROTKAPO

Mi diros al la leterportisto ke li alportu ĝin morgaŭ matene, en sia azenkariolo. Ĉu vi havas vian deponateston?

ANNETTE

Le voilà.

POIL DE CAROTTE

Ne le perdez pas. — Comment vous appelez-vous ?

ANNETTE

Annette Perreau.

POIL DE CAROTTE

Annette Perreau... Je vous appellerai Annette. C'est facile à prononcer. — Moi, je suis Poil de Carotte.

ANNETTE

Plaît-il ?

POIL DE CAROTTE

Poil de Carotte. — Vous savez bien ?

ANNETTE

Non.

POIL DE CAROTTE

Le plus jeune des fils Lepic, celui qu'on appelle Poil de Carotte. Madame Lepic ne vous a pas parlé de moi ?

ANNETTE

Du tout.

ANNETO

Jen ĝi.

KAROTKAPO

Ne perdu ĝin – Kiel vi nomiĝas?

ANNETO

Anneto Pero.

KAROTKAPO

Anneto Pero ... Mi nomos vin Anneto. Tio estas facile prononcebla. —
Mi, mi estas Karotkapo.

ANNETO

Kiel?

KAROTKAPO

Karotkapo. - Vi scias, ĉu ne?

ANNETO

Ne.

KAROTKAPO

La plej juna el Lepikaj filoj, tiu kiun oni nomas Karotkapo. Ĉu sinjorino Lepiko ne parolis al vi pri mi?

ANNETO

Tute ne.

POIL DE CAROTTE

Ça m'étonne. — Vous êtes contente d'être au service de la famille Lepic ?

ANNETTE

Je ne sais pas. Ça dépendra.

POIL DE CAROTTE

Naturellement. — La maison est assez bonne.

ANNETTE

Il y a beaucoup de travail ?

POIL DE CAROTTE

Non. Dix mois sur douze, Monsieur et Madame Lepic vivent seuls. Vous avez un peu plus de mal pendant que nous sommes en vacances, mon frère et moi. Ce n'est jamais écrasant.

ANNETTE

Oh ! je suis forte !

POIL DE CAROTTE

Vous paraissez solide... D'ailleurs, je vous aide.
Étonnement d'Annette... Je veux dire... *Gêné, il s'approche.*
Écoutez, Annette, quand je suis en vacances, je ne peux pas toujours jouer comme un fou ; alors, ça me distrait de vous aider... Comprenez-vous ?

KAROTKAPO

Tio mirigas min. — Ĉu vi estas kontenta servi al la Lepika familio?

ANNETO

Mi ne scias. Tio dependos.

KAROTKAPO

Kompreneble. — La hejmetoso estas sufiĉe bona.

ANNETO

Ĉu estas multe da laboro?

KAROTKAPO

Ne. Dek el dek du monatojn, gesinjoroj Lepikoj vivas solaj. Vi havas iomete pli da peniga laboro kiam ni ferias, mia frato kaj mi. Tio neniam pezegas.

ANNETO

Ho! Mi estas forta!

KAROTKAPO

Vi ŝajnas fortika... Cetere, mi helpas vin. *Miro de Anneto...* Mi volas diri... *Embarasata, li alproksimiĝas.* Aŭskultu, Anneto, kiam mi ferias, mi ne ĉiam povas ludi kiel frenezulo; do, helpi vin distras min... Ĉu vi komprenas?

ANNETTE, écarquillant les yeux.

Non. Vous m'aidez ? à quoi, Monsieur Lepic ?

POIL DE CAROTTE

Appelez-moi Poil de Carotte. C'est mon nom.

ANNETTE

Monsieur Poil de Carotte !

POIL DE CAROTTE

Pas Monsieur... Monsieur Poil de Carotte !... Si Madame Lepic vous entendait, elle se tordrait. Appelez- moi Poil de Carotte, tout court, comme je vous appelle Annette.

ANNETTE

Poil de Carotte, ce n'est pas un nom de chrétien. Vous avez un autre nom, un petit nom de baptême.

POIL DE CAROTTE

Il ne sert pas depuis le baptême... On l'a oublié.

ANNETTE

Où avez-vous pris ce surnom ?

POIL DE CAROTTE

C'est Madame Lepic qui me l'a donné, à cause de là couleur de mes cheveux.

ANNETO, malfermeganta la okulojn

Ne. Ĉu vi helpas min? Por kio, sinjoro Lepiko?

KAROTKAPO

Bonvolu nomi min Karotkapo. Tio estas mia nomo.

ANNETO

Sinjoro Karotkapo!

KAROTKAPO

Ne sinjoro... Sinjoro Karotkapo!... Se s-ino Lepiko aŭdus vin, ŝi senbride ridus. Nomu min Karotkapo, tutsimple, kiel mi nomas vin Anneto.

ANNETO

Karotkapo, tio ne estas kristana nomo. Vi havas alian nomon, propran baptonomon.

KAROTKAPO

Oni ne uzas ĝin ekde la bapto... Oni forgesis ĝin.

ANNETO

Kial vi ricevis tiun alnomon?

KAROTKAPO

SinJORINO Lepiko nomis min tiel, pro la koloro de miaj haroj.

ANNETTE

Ils sont blonds.

POIL DE CAROTTE

Blonds ardents. Madame Lepic les voit rouges, elle a de bons yeux. Appelez-moi Poil de Carotte.

ANNETTE

Je n'ose pas.

POIL DE CAROTTE

Puisque je vous le permets !

ANNETTE

Poil... de...

POIL DE CAROTTE

Puisque je vous l'ordonne. — Et prenez cette habitude tout de suite, car dès demain matin, (ce soir je vais à la chasse avec Monsieur Lepic) dès demain matin, nous nous partagerons la besogne.

ANNETTE

Que me dites-vous là ! *Elle rit.*

POIL DE CAROTTE, froid.

Vous êtes de bonne humeur.

ANNETO

Ili estas blondaj.

KAROTKAPO

Arde blondaj. Sinjorino Lepiko vidas ilin ruĝaj, ŝi havas bonajn okulojn. Nomu min Karotkapo.

ANNETO

Mi ne kuraĝas.

KAROTKAPO

Sed mi permesas al vi!

ANNETO

Karoto... Kap...

KAROTKAPO

Ĉar mi ordonas al vi. — Kaj kutimiĝu tuj, ĉar ekde morgaŭ matene, (hodiaŭ vespere mi iros ĉasi kun sinjoro Lepiko) ekde morgaŭ matene, ni dividos la labortaskojn.

ANNETO

Kion vi diras al mi! *Ŝi ridas.*

KAROTKAPO, ĝlacia.

Vi estas bonhumora.

ANNETTE

Excusez-moi.

POIL DE CAROTTE

Oh ! ça ne fait rien ! Entendons-nous, afin que l'un ne gêne pas l'autre. Nous nous levons tous deux à cinq heures et demie précises.

ANNETTE

Vous aussi ?

POIL DE CAROTTE

Oui. Je ne fais qu'un somme, mais je ne peux pas rester au lit le matin. Je vous réveillerai. Nos deux chambres se touchent, près du grenier. Aussitôt levé, je m'occupe des bêtes. — J'ai une passion pour les bêtes. Je porte la soupe au chien. Je jette du grain aux poules et de l'herbe aux lapins. — De votre côté vous allumez le feu et vous préparez les déjeuners de la famille Lepic. Madame Lepic...

ANNETTE

Votre mère ?

POIL DE CAROTTE

Oui... prend du café au lait. Monsieur Lepic...

ANNETTE

Votre père ?

ANNETO

Pardonu min.

KAROTKAPO

Ho ! Ne gravas. Ni akordiĝu tiel kiel neniuj ĝenas la alian. Ambaŭ ni ellitĝas akurate je la kvina kaj duono.

ANNETO

Vi ankaŭ?

KAROTKAPO

Jes. Mi dormas senrompe sed mi ne povas matene resti en la lito. Mi vekos vin. Niaj du ĉambroj sin tuŝas, apud la grenejo. Tuj ellitiĝinte mi prizorgas la bestojn. — Mi pasie ŝatas la bestojn. Mi alportas la supon al la hundo. Mi ĵetas grenon al kokoj kaj herbon al kunikloj. — Viaflanke, vi ekbruligas la fajron kaj preparas la matenmanĝojn de la Lepika familio. Sinjorino Lepiko...

ANNETO

Via patrino?

KAROTKAPO

Jes... trinkas laktokafon. Sinjoro Lepiko...

ANNETO

Via patro ?

POIL DE CAROTTE

Oui, — Ne m'interrompez pas, Annette, — Monsieur Lepic prend du café noir et mon frère Félix du chocolat.

ANNETTE

Et vous ?

POIL DE CAROTTE

Vous, Annette, on vous gâtera les premiers jours. Vous prendrez probablement du café au lait, comme Madame Lepic. Après, elle avisera.

ANNETTE

Et vous ?

POIL DE CAROTTE

Oh ! moi, je prends ce que je veux, dans le buffet, un reste de soupe, je mange un morceau de pain sur le pouce, je varie, ou rien. Je n'ai pas une grosse faim au saut du lit.

ANNETTE

Vous n'aimez pas, comme votre frère, Monsieur Félix, le chocolat ?

POIL DE CAROTTE

Non, à cause de la peau. — Toute la matinée je travaille à mes devoirs de vacances. — Vous, Annette,

KAROTKAPO

Jes, — Ne interrompu min, Anneto, — sinjoro Lepiko trinkas nigran kafon kaj mia frato Felikso ĉokoladon.

ANNETO

Kaj vi?

KAROTKAPO

Vin, Anneto, oni dorlotos dum la unuaj tagoj. Vi probable trinkos laktokafon, kiel sinjorino Lepiko. Poste, ŝi decidos.

ANNETO

Kaj vi?

KAROTKAPO

Ho! mi, mi prenas tion kion mi volas, en la manĝoŝranko, restaĵon de supo, mi starmanĝas pecon de pano, mi variigas, aŭ nenion. Mi ne malsategas ĵus ellitiĝinte.

ANNETO

Ĉu vi ne ŝatas ĉokoladon, kiel via frato, sinjoro Felikso?

KAROTKAPO

Ne, pro la laktohaŭteto. — Dum la tuta mateno, mi laboras pri miaj feriaj lerntaskoj. Vi, Anneto,

vous ne vous croisez pas les bras; vous attrapez les chaussures ; graissez à fond les souliers de chasse de Monsieur Lepic.

ANNETTE

Bien.

POIL DE CAROTTE

Ne cirez pas trop les bottines, le cirage les brûle.

ANNETTE

Bien, bien.

POIL DE CAROTTE

Vous faites les lits, les chambres, le ménage. Ah ! je vous tirerai vos seaux du puits : vous n'aurez qu'à m'appeler, c'est de l'exercice pour moi... Tenez, que je vous montre. *Il tire avec peine un seau d'eau qu'il laisse sur la margelle.* Ça me fortifie... Tant que vous en voudrez, Annette. — Cuisinez-vous un peu ?

ANNETTE

Je sais faire du ragoût.

POIL DE CAROTTE

C'est toujours ça ; mais vous ne serez guère au fourneau.

Madame Lepic est un cordon bleu, et quand elle a bon appétit, on se lèche les doigts. — À midi sonnant, je vais à la cave.

vi ne devas resti kun krucitaj brakoj; vi ekprenu la ŝuojn ; vi tute ŝmiru per graso la ĉasajn ŝuojn de sinjoro Lepiko.

ANNETO

Bone.

KAROTKAPO

Ne tro ciru la botetojn, ciro bruligas ilin.

ANNETO

Bone, bone.

KAROTKAPO

Vi pretigu litojn, dormĉambrojn, vi tenu la hejmon pura. He ! mi tiros por vi viajn sitelojn el la puto : vi nur bezonos voki min, tio estas ekzercado por mi... Jen, mi montros al vi. *Li pene eltiras sitelon plenan de akvo kaj lasas ĝin sur la putorando.* Tio fortigas min... Tiom kiom vi volos, Anneto. — Ĉu vi iomete preparas manĝon ?

ANNETO

Mi scias kuiru raguon.

KAROTKAPO

Tio estas pli ol nenio ; sed vi ne ofte kuiras. Sinjorino Lepiko estas elstara kuiristino, kaj kiam ŝi havas bonan apetiton, ni frande ĝuas. — Precize je la tagmezo, mi iras al la kelo.

ANNETTE

Ah ! c'est vous qui avez la confiance ?

POIL DE CAROTTE

Oui, Annette, c'est moi, et puis l'escalier est dangereux.

Ces fonctions me rapportent : je vends les vieilles feuilletes à mon bénéfice, et je place l'argent dans le tiroir de Madame Lepic. — N'ayez crainte, Annette, parce que j'ai la clef de la cave, vous ne serez pas privée de vin.

ANNETTE

Oh ! une goutte, à chaque repas...

POIL DE CAROTTE

Moi, jamais... Le vin me monte à la tête ; je ne bois que de notre eau, qui est la meilleure du village. — Bien entendu, vous servez à table. On change d'assiettes le moins possible.

ANNETTE

Tant mieux !

POIL DE CAROTTE

C'est à cause des assiettes. — Après le repas, la vaisselle. Quelquefois je vous donne un coup de main.

ANNETTE

Pour la laver ?

ANNETO

Ha! Ĉu vi estas la fidulo?

KAROTKAPO

Jes, Anneto, mi estas, kaj plie la ŝtuparo estas danĝera. Mi enspezas per tiaj funkcioj: mi vendas la malnovajn barelojn por mia profito, kaj mi metas la monon en la tirkeston de sinjorino Lepiko. — Ne timu, Anneto, ĉar mi havas la ŝlosilon de la kelo, al vi ne mankos vino.

ANNETO

Ho! unu guton, je ĉiu manĝo...

KAROTKAPO

Mi, neniam... La vino kaŭzas al mi kapturnon; mi nur trinkas nian akvon, kiu estas la plej bongusta el la vilaĝo. —Kompreneble, vi servas ĉe la tablo. Oni ŝanĝas telerojn kiel eble plej malofte.

ANNETO

Des pli bone!

KAROTKAPO

Pro la teleroj. — Post la manĝo, la manĝilaro. Kelkfoje, mi iom helpas vin.

ANNETO

Por lavi ĝin?

POIL DE CAROTTE

Pour la ranger, Annette, quand on a sorti le beau service !

ANNETTE

Il y a souvent de la société ?

POIL DE CAROTTE

Rarement. Monsieur Lepic, qui n'aime pas le monde, fait la tête aux invités de Madame Lepic et ils ne reviennent plus. — Par exemple, le soir, Annette, je n'ai rien à faire.

ANNETTE

Rien ?

POIL DE CAROTTE

Presque rien. Je m'occupe à ma guise, en fumant une cigarette.

ANNETTE

Oh ! oh !

POIL DE CAROTTE

Oui, Monsieur Lepic m'en offre quelquefois, et ça l'amuse, parce que ça me donne un peu mal au cœur. — Je bricole, je jardine, je cultive des fleurs, j'arrache un panier de pommes de terre, des pois secs que j'écosse à mes moments perdus.

KAROTKAPO

Por enmebligi ĝin, kiam oni uzis la belan manĝilaron !

ANNETO

Ĉu estas ofte vizitantoj?

KAROTKAPO

Malofte. Sinjoro Lepiko, kiu ne ŝatas gastigi, malplaĉe mienas al la gastoj de sinjorino Lepiko kaj ili neniam revenas. — Ekzemple, vespere, Anneto, estas nenio ke mi devas fari.

ANNETO

Nenio?

KAROTKAPO

Preskaŭ nenio. Mi okupiĝas laŭvole, fumante cigaredon.

ANNETO

Ho ho!

KAROTKAPO

Jes, sinjoro Lepiko foje donacas kelkajn al mi, kaj tio amuzas lin, ĉar tio iomete naŭzas min. — Mi bagatelumas, mi ĝardenas, mi kulturadas florojn, mi elterigas unu korbon da terpomoj, sekajn pizojn kiujn mi elguŝigas kiam mi ne havas alian okupon.

ANNETTE

Quoi encore ?

POIL DE CAROTTE

Oh ! je ne me foule pas. Quand vous êtes arrivée, je désherbaï la cour, sans me biler. Des oies avec leur bec iraient plus vite que moi.

ANNETTE

Et c'est tout ?

POIL DE CAROTTE

C'est tout. Je fais peut-être aussi quelques commissions pour Madame Lepic, chez l'épicière, la fermière, ou, à la ville, chez le pharmacien... et le reste du temps, je suis libre.

ANNETTE

Et votre frère Félix, qu'est-ce qu'il fait toute la journée ?

POIL DE CAROTTE

Il n'est pas venu en vacances pour travailler. Et il n'a pas ma santé. Il est délicat...

ANNETTE

Il se soigne.

ANNETO

Kion ankoraŭ ?

KAROTKAPO

Ho ! mi ne tro penas. Vi alvenis, dum mi senherbigis la korton, sen cerbumi. Anseroj per siaj bekoj, pli rapidus ol mi.

ANNETO

Ĉu tio estas la tuto?

KAROTKAPO

Tio estas la tuto. Eble mi butikumas por sinjorino Lepiko, ĉe la nutraĵvendistino, la farmistino, aŭ en urbo, ĉe la apotekisto... kaj dum cetera tempo, mi estas libera.

ANNETO

Kaj via frato Felikso, kion li faras tuttage?

KAROTKAPO

Li ne venis ferii por labori. Kaj li ne havas tiel fortikan sanon kiel mi. Li estas delikata...

ANNETO

Li sin prizorgas.

POIL DE CAROTTE

C'est son affaire... — Pendant que je me repose, l'après-midi, vous, Annette, ah! ça, c'est pénible, vous allez le plus souvent à la rivière.

ANNETTE

Ils salissent tant de linge !

POIL DE CAROTTE

Non, mais il y a les pantalons de chasse de Monsieur Lepic : par la pluie, il rapporte des kilos de boue. Ça sèche et c'est indécrottable. Il faut savonner et taper dessus à se démettre l'épaule. Annette, les pantalons de Monsieur Lepic se tiennent droits dans la rivière comme de vraies jambes !

ANNETTE

Il ne porte donc pas de bottes ?

POIL DE CAROTTE

Ni bottes, ni guêtres. Il ne se retrouse même pas. Monsieur Lepic est un vrai chasseur. — Au fond, je crois qu'il patauge exprès pour contrarier Madame Lepic...

ANNETTE, curieuse

Ils se taquent ?

KAROTKAPO

Tio estas lia afero... — Dum mi ripozas, posttagmeze, vi, Anneto, ve! tio estas peniga, vi plejofte iras al la rivero.

ANNETO

Ili malpurigas tiom da domtukoj!

KAROTKAPO

Ne, sed, estas la ĉasaj pantalonoj de sinjoro Lepiko : dum pluvo, li transportas kilogramojn da koto. Tio sekiĝas kaj estas neskrapebla. Necesas sapumi kaj frapi ilin tiel, ke oni povus elartikigi la ŝultron. Nu, Anneto, la pantalonoj de sinjoro Lepiko rekte staras en la rivero kiel veraj kruroj !

ANNETO

Ĉu do li ne surhavas botojn ?

KAROTKAPO

Nek botoj, nek gamaŝoj. Li eĉ ne kuspas ilin. Sinjoro Lepiko estas vera ĉasisto. — Fakte, mi pensas ke li intence vadas por ĉagreni sinjorinon Lepikon...

ANNETO, scivola

Ĉu ili incitetadas unu la alian?

POIL DE CAROTTE

... Mais comme ce n'est pas Madame Lepic qui va à la rivière, il ne contrarie que vous. Tant pis pour vous, ma pauvre Annette, je n'y peux rien : vous êtes la servante.

ANNETTE

Ils sont sévères ?

POIL DE CAROTTE, confidentiel.

Écoutez, Annette, sans quoi vous feriez fausse route : C'est Monsieur Lepic qui a l'air sévère et c'est Madame Lepic... chut ! *Il entend du bruit et se précipite sur sa pioche. Une femme passe dans la rue. Il se rassure. Ce chardon m'agaçait... Oui, Annette. Il jette sa pioche, s'assied dans la brouette, met une corbeille de pois sur ses genoux et écosse. Annette en prend une poignée. Oh ! laissez, profitez de votre reste...— Oui, Annette, Monsieur Lepic, à première vue, impressionne, mais on ne le voit guère. Il est tout le temps dehors, à Paris, pour un procès interminable , ou à la chasse pour notre garde-manger. À la maison, c'est un homme préoccupé et taciturne. Il ne rit que dans sa barbe et encore ! il faut que mon frère Félix soit bien drôle... Il aime mieux se faire comprendre par un geste que par un mot. S'il veut du pain, il ne dit pas : « Annette, donnez-moi le pain. » Il se lève et va le chercher lui-même, jusqu'à ce que vous preniez l'habitude de vous apercevoir qu'il a besoin de pain.*

KAROTKAPO

.... Sed ĉar ne estas sinjorino Lepiko tiu, kiu iras al la rivero, li ĉagrenas nur vin. Des pli malbone por vi, mia kompatinda Anneto, mi estas senpova pri tio: vi estas la servistino.

ANNETO

Ĉu ili estas severaj?

KAROTKAPO, konfidence

Aŭskultu, Anneto, se ne, vi vojerarus: sinjoro Lepiko estas tiu, kiu severa mienas kaj sinjorino Lepiko estas tiu, silentu! *Li aŭdas bruon kaj haste prenas sian pioĉon. Virino forpasas sur la strato. Li trankviliĝas. Tiu kardo agacis min... Jes, Anneto. Li jetas sian pioĉon, sidiĝas en la ĉarumon, metas korbbon da pizoj sur siajn genuojn kaj elĝuŝigas. Anneto prenas manplenom da pizoj. Ho! Lasu, profitu de via ripozo... Jes, Anneto, sinjoro Lepiko, unuavide, impresas, sed oni vidas lin apenaŭ. Li ĉiam estas ekstere, en Parizo, por senfina proceso, aŭ ĉasante por nia manĝoŝranko. Hejme, li estas zorgema kaj silentema homo. Li nur ridas en sia barbo kaj eĉ necerte! Necesas ke mia frato Felikso estu tre amuza... Li preferas komprenigi sin per gesto ol per vorto. Se li volas panon, li ne diras: « Anneto, donu al mi panon ». Li stariĝas kaj iras li mem preni ĝin, ĝis vi kutimiĝas rimarki, ke li bezonas panon.*

ANNETTE

C'est un original.

POIL DE CAROTTE

Vous ne le changerez pas.

ANNETTE

Il vous aime bien ?

POIL DE CAROTTE

Je le suppose. Il m'aime à sa manière, silencieusement.

ANNETTE

Il n'a donc pas de langue ?

POIL DE CAROTTE

Si, Annette, à la chasse, une fameuse pour son chien. Il n'en a pas pour la famille.

ANNETTE

Même pour se disputer avec Madame Lepic ?

POIL DE CAROTTE

Non. Mais Madame Lepic parle et se dispute toute seule, et plus Monsieur Lepic se tait, plus elle cause, avec tout le monde, avec Monsieur Lepic qui ne répond

ANNETO

Li estas originalulo.

KAROTKAPO

Vi ne ŝanĝos lin.

ANNETO

Ĉu li iom amas vin ?

KAROTKAPO

Mi supozas tion. Li amas min siamaniere, silente.

ANNETO

Ĉu li do ne havas langon ?

KAROTKAPO

Jes, Anneto, ĉasante, unu viglan por sia hundo. Li ne havas ĝin por sia familio.

ANNETO

Eĉ por kvereli kun sinjorino Lepiko ?

KAROTKAPO

Ne. Sed sinjorino Lepiko parolas kaj kverelas tute sola, kaj ju pli sinjoro Lepiko silentas, des pli ŝi paroladas, kun ĉiuj, kun sinjoro Lepiko kiu ne respondas,

pas, avec frère Félix qui répond quand il veut, avec moi qui réponds, quand elle veut, et avec le chien qui remue la queue.

ANNETTE

Elle est toquée ?

POIL DE CAROTTE

Vous dites ? — Faites attention, Annette, elle n'est pas sourde.

ANNETTE

Elle est maligne ?

POIL DE CAROTTE

Pour vous, la servante, elle est bien, en moyenne. Tantôt elle vous appelle ma fille et tantôt espèce d'hébété, — pour Monsieur Lepic, elle est comme si elle n'existait pas ; pour mon frère Félix, c'est une mère. Elle l'adore.

ANNETTE

Et pour vous ?

POIL DE CAROTTE, vague.

C'est une mère aussi.

ANNETTE

Elle vous adore ?

kun frato Felikso kiu respondas kiam li volas, kun mi kiu respondas, kiam ŝi volas, kaj kun la hundo kiu svingas la voston.

ANNETO

Ĉu ŝi estas frenezeta?

KAROTKAPO

Kion vi diras ? — Atentu, Anneto, ŝi ne estas surda.

ANNETO

Ĉu ŝi estas malbonema?

KAROTKAPO

Por vi, la servistino, ŝi estas ĝenerale bonvola. Ŝi nomas vin foje mia filino kaj refoje speco de stultulo, — por sinjoro Lepiko, ŝi estas kvazaŭ ŝi ne ekzistus ; por mia frato Felikso, ŝi ja estas patrino. Ŝi adoras lin.

ANNETO

Kaj por vi?

KAROTKAPO, malpreciza.

Ŝi estas patrino ankaŭ.

ANNETO

Ĉu ŝi adoras vin ?

POIL DE CAROTTE

Nous n'avons pas, Félix et moi, la même nature.

ANNETTE

Elle vous déteste, hein ?

POIL DE CAROTTE

Personne ne le sait, Annette. Les uns disent qu'elle ne peut pas me souffrir et les autres qu'elle m'aime beaucoup, mais qu'elle cache son jeu.

ANNETTE

Vous devez le savoir mieux que n'importe qui.

POIL DE CAROTTE. Il se lève et pose la corbeille de pois près du mur.

Si elle cache son jeu, elle le cache bien.

ANNETTE

Pauvre petit Monsieur !...

POIL DE CAROTTE

Une dernière recommandation, Annette. N'oubliez pas, à la tombée de la nuit...

ANNETTE

Vous avez l'air plutôt gentil.

KAROTKAPO

Ni ne havas, Felikso kaj mi, la saman naturon.

ANNETO

Ŝi malamas vin, ĉu ne?

KAROTKAPO

Neniu scias tion, Anneto. Unuj diras ke ŝi abomenas min kaj aliaj ke ŝi multe amas min, sed ke ŝi maskas la veron.

ANNETO

Vi devas scii tion pli bone ol iu ajn.

KAROTKAPO. Li ekstaras kaj metas la korbon de pizoj apud la muron.

Se ŝi maskas la veron, ŝi bone maskas ĝin.

ANNETO

Kompatinda juna sinjoro!...

KAROTKAPO

Lastan rekomendon, Anneto. Ne forgesu, je la subiro de la suno...

ANNETO

Vi ŝajnas sufiĉe afabla.

POIL DE CAROTTE

Ah ! vous trouvez ?... Il parait qu'il ne faut pas s'y fier.

ANNETTE

Non ?

POIL DE CAROTTE

Il parait.

ANNETTE

Vous avez des petits défauts ?

POIL DE CAROTTE

Des petits et des gros. Je les ai tous. *Il compte sur ses doigts.* Je suis menteur, hypocrite, malpropre, ce qui ne m'empêche pas d'être paresseux et têtus...

ANNETTE

Tout ça à la fois ?

POIL DE CAROTTE

Et ce n'est pas tout. J'ai le cœur sec et je ronfle... Il y a autre chose... Ah ! je boude, et c'est même là peut-être le principal de mes défauts. On affirme que, malgré les coups, je ne m'en corrigerai jamais...

ANNETTE

Elle vous bat ?

KAROTKAPO

Ha! Ĉu vi pensas? Oni diras, ke oni ne devas senrezerve kredi tion.

ANNETO

Ĉu ne?

KAROTKAPO

Oni diras.

ANNETO

Ĉu vi havas malgrandajn difektojn?

KAROTKAPO

Malgrandajn kaj grandajn. Mi havas ĉiujn. *Li nombras fingre.* Mi estas mensogema, hipokrita, malpurema, sed tio ne malhelpas, ke mi estas mallaborema kaj obstina...

ANNETO

Ĉio samtempe ?

KAROTKAPO

Kaj tio ne estas la tuto. Mi havas sekan koron kaj mi ronkas... Estas alia afero... Ha! Mi paŭtas, kaj tio estas eble mia ĉefa difekto. Oni asertas ke, malgraŭ la battoj, mi neniam korektiĝos...

ANNETO

Ĉu ŝi batas vin?

POIL DE CAROTTE

Oh ! quelques gifles.

ANNETTE

Elle a la main leste ?

POIL DE CAROTTE

Une raquette.

ANNETTE

Elle vous donne de vraies gifles ?

POIL DE CAROTTE, léger.

Ça ne fait pas mal ; j'ai la peau dure. C'est plutôt le procédé qui m'humilie parce que je commence à être un grand garçon. Je vais avoir seize ans.

ANNETTE

Je ne peux pas me figurer que vous êtes un mauvais sujet.

POIL DE CAROTTE

Patience, vous y viendrez.

ANNETTE

Je ne crois pas.

POIL DE CAROTTE

Madame Lepic vous y amènera.

KAROTKAPO

Ho ! Kelkaj vangobatoj.

ANNETO

Ĉu ŝia mano estas vigla ?

KAROTKAPO

Kiel rakedo.

ANNETO

Ĉu ili estas veraj vangobatoj ?

KAROTKAPO, *malserioza*.

Tio ne doloras min; mia haŭto estas dika. Fakte pli ĝuste la maniero humiligas min ĉar mi ekfariĝas juna viro. Mi baldaŭ estos deksesjara.

ANNETO

Mi ne povas imagi ke vi estas malbonulo.

KAROTKAPO

Paciencu, vi fine konsentos pri tio.

ANNETO

Mi ne kredas.

KAROTKAPO

SinJORINO Lepiko kondukos vin al tio.

ANNETTE

Si je veux.

POIL DE CAROTTE

De gré ou de force, Annette ; elle vous retournera comme une peau de lièvre, et je ne vous conseille pas de lui résister.

ANNETTE

Elle me mangerait ?

POIL DE CAROTTE

Elle se gênerait !...

ANNETTE

Bigre !

POIL DE CAROTTE

Je veux dire qu'elle vous flanquerait à la porte.

ANNETTE

Si je m'en allais tout de suite ?

POIL DE CAROTTE, inquiet.

Attendez quelques jours. Madame Lepic fera bon accueil à votre nouveau visage. Comptez sur un mois d'agrément avec elle et, jusqu'à ce qu'elle vous prenne

ANNETO

Se mi volas.

KAROTKAPO

Vole nevole, Anneto ; ŝi kuspos vin kiel haŭton de leporo, kaj mi rekomendas al vi ne rezisti al ŝi.

ANNETO

Ĉu ŝi manĝus min?

KAROTKAPO

Ŝi sin ĝenus!...

ANNETO

Ha!

KAROTKAPO

Mi volas diri, ke ŝi maldungus vin.

ANNETO

Kaj se mi tuj forirus ?

KAROTKAPO, malkvieta.

Atendu kelkajn tagojn. Sinjorino Lepiko afable akceptos vian novan vizaĝon. Kalkulu unu monaton de agrabla vivo kun ŝi kaj, ĝis ŝi ekabomenos vin,

en grippe, demeurez ici, Annette, vous n'y serez pas plus mal qu'ailleurs, et... je vous aime autant qu'une autre.

ANNETTE

Je vous conviens ?

POIL DE CAROTTE

Vous ne me déplaitez pas et je suis persuadé que si chacun de nous y met du sien, ça ira tout seul.

ANNETTE

Moi, je le souhaite.

POIL DE CAROTTE

Mais dites toujours comme Madame Lepic, soyez toujours avec elle, contre moi.

ANNETTE

Ce serait joli !

POIL DE CAROTTE

Au moins faites semblant dans notre intérêt ; rien ne nous empêchera, quand nous serons seuls, de redevenir camarades.

ANNETTE

Oh ! je vous le promets.

restu ĉi tie, Anneto, vi ne estos malpli komforte tie ol aliloke, kaj... mi ŝatas vin kiel iun ajn.

ANNETO

Ĉu mi konvenas por vi?

KAROTKAPO

Vi ne malplaĉas al mi kaj mi certas ke se ni ambaŭ kunlaboros, ĉio glatos.

ANNETO

Mi, mi esperas tion.

KAROTKAPO

Sed diru ĉiam same kiel sinjorino Lepiko, akordu ĉiam kun ŝi, kontraŭ mi.

ANNETO

Estus honto!

KAROTKAPO

Almenaŭ ŝajnigu en nia intereso ; nenio malhelpos al ni, kiam ni estos solaj, denove kamaradiĝi.

ANNETO

Ho! Mi promesas tion al vi.

POIL DE CAROTTE

Vous voyez comme j'ai le cœur sec, Annette, je me confie à la première venue.

ANNETTE

Le fait est que vous n'êtes pas fier.

POIL DE CAROTTE

Je vous prie seulement de ne jamais me tutoyer. L'autre servante me tutoyait sous prétexte qu'elle était vieille et elle me vexait. Appelez-moi Poil de Carotte comme tout le monde...

ANNETTE, discrètement.

Non, non.

POIL DE CAROTTE

... Ne me tutoyez pas.

ANNETTE

Je ne suis pas une effrontée. Je vous jure que...

POIL DE CAROTTE

C'est bon, c'est bon, Annette. — Je vous disais que j'ai une dernière recommandation à vous faire. Monsieur Lepic et moi, nous irons tout à l'heure à la chasse. Comme on rentre tard, j'avale ma soupe et je me

KAROTKAPO

Vi vidas, kiel seka estas mia koro, Anneto, mi min konfidas al la unua venantino.

ANNETO

Fakte vi ne estas fiera.

KAROTKAPO

Mi nur petas al vi, ke vi neniam familiare parolu al mi. La alia servistino familiare parolis al mi pretekste, ke ŝi estas maljuna, kaj ŝi ofenditis min. Nomu min Karotkapo kiel ĉiuj...

ANNETO, diskrete

Ne, ne.

KAROTKAPO

... Ne familiare parolu al mi.

ANNETO

Mi ne estas malrespekta. Mi ĵuras al vi, ke...

KAROTKAPO

Bone, Bone, Anneto. — Mi estis dirante al vi, ke mi havas lastan rekomendon fari al vi. Sinjoro Lepiko kaj mi post momento iros ĉasi. Ĉar ni revenas malfrue, mi rapide glutas supon kaj

couche, éreinté. N'oubliez donc pas, ce soir, de fermer les bêtes.
D'ailleurs, c'est toujours vous qui les fermez.

ANNETTE

Un pas de plus ou de moins !

POIL DE CAROTTE

Oh ! oh ! Annette, les premières fois que vous traverserez cette cour noire de nuit, sans lanterne, la pluie sur le dos, le vent dans les jupes...

ANNETTE

J'aurai de la veine si j'en réchappe...

POIL DE CAROTTE

Hier soir, vous n'étiez pas là, j'ai dû les fermer, et je vous certifie, Annette, que ça émotionne.

ANNETTE

Vous êtes donc peureux ?

POIL DE CAROTTE

Oh ! non ! permettez, je ne suis pas peureux. Madame Lepic vous le dira elle-même, je suis tout ce qu'elle voudra, mais je suis brave. Regardez cette grange. C'est là que je me réfugie, quand il fait de l'orage. Eh ! bien, Annette, les plus gros coups de

mi lacega enlitiĝas. Do, ne forgesu, hodiaŭ vespere, enfermi la bestojn. Cetere, vi ĉiam enfermu la bestojn.

ANNETO

Unu plian aŭ malplian paŝon !

KAROTKAPO

Ho, ho ! Anneto, la unuajn fojojn, kiam vi trairos nokte tiun nigran korton, sen lanterno, la pluvo sur dorso, la vento sur jupo...

ANNETO

Mi bonŝancos se mi postvivos...

KAROTKAPO

Hieraŭ vespere, vi ne ĉeestis, necesis ke mi enfermu ilin, kaj mi certigas al vi, Anneto, ke tio emocias.

ANNETO

Vi do estas timema, ĉu ne?

KAROTKAPO

Ho ! Ne ! Atentu, mi ne estas timema. Sinjorino Lepiko mem, diros tion al vi. Mi estas io ajn, kion ŝi deziras sed mi estas bravulo. Vidu tiun grenejon. Tie mi rifuĝas, kiam fulmas. Nu, Anneto, eĉ la plej fortaj tondrofrapoj ne malhelpas min pluludi al « Kolombo flugas ! »(*).

(*) Ludo por junaj infanoj. Normale, estas multaj partoprenantoj. Unu el partoprenantoj citu diversajn objektojn aŭ bestojn, sekvatajn de 'flugas', kiel ekzemple « ansero flugas, anaso flugas, azeno flugas ... » kaj ĉiuj aliaj levu la brakon, se ĝi vere flugas. Partoprenanto, kiu eraras, ricevas ludpunon.

tonnerre ne m'empêchent pas d'y continuer une partie de pigeon vole !

ANNETTE

Tout seul ?

POIL DE CAROTTE

C'est aussi amusant qu'à plusieurs. Quand j'ai un gage, j'embrasse ma main ou le mur. — Vous voyez si j'ai peur ! Mais chacun nos besognes, Annette : une des vôtres, d'après les instructions de Madame Lepic, c'est de fermer les bêtes le soir, et vous les fermerez.

ANNETTE

Oh ! c'est inutile de nous chamailler déjà, je veux bien, je ne suis pas poltronne.

POIL DE CAROTTE

Moi non plus ! Annette, je n'ai peur de rien, ni de personne. Parfaitement, de personne. *Avec autorité.* Mais il s'agit de savoir qui de nous deux ferme les bêtes ; or, la volonté de Madame Lepic, sa volonté formelle...

MADAME LEPIC, surgissant.

Poil de Carotte, tu les fermeras tous les soirs.

ANNETO

Tute sola ?

KAROTKAPO

SINJORINO LEPIKO, *komence de nervkrizo, poŝtuko ĉe la lipoj.*

La bruo altiras Anneton sur la ŝtuparon.

Jen kiel oni parolas al mi antaŭ fremdulino kaj antaŭ miaj infanoj, kiuj
devas respekti min. Dio, kion mi faris al la ĉielo por esti mistraktata kiel la
plej malestiminda!

MONSIEUR LEPIC, calme, à Annette.

Je vous avertis, Annette, que Madame va avoir une crise ; mais ce n'est qu'un jeu ; elle se tord les bras, mais prenez garde, elle n'égratignerait que vous ; elle mange son mouchoir, elle ne l'avale pas : elle menace de se jeter dans le puits, il y a un grillage. Elle fait semblant de courir partout, affolée, et elle va droit chez le curé.

MADAME LEPIC, suffoquée.

Jamais, jamais, je ne remettrai les pieds dans cette maison.

MONSIEUR LEPIC

À ce soir !

MADAME LEPIC déjà dans la rue, d'une voix lointaine.

Seigneur, ne laisserez-vous pas tomber enfin sur moi un regard de miséricorde ?

ANNETTE

Je vais suivre madame, elle est dans un état !

MONSIEUR LEPIC

Comédie !

Annette sort.

SINJORO LEPIKO, *kvieta, al Anneto.*

Mi avertas vin, Anneto, ke la sinjorino tuj havos nervokrizon ; sed tio estas nur ludo ; ŝi tordas al si la brakojn, sed atentu, ŝi nur vin gratvundus ; ŝi manĝas sian naztukon, ŝi ne glutas ĝin : ŝi minacas ĵetiĝi en la puton, estas krado. Ŝi ŝajnigas kuri ĉien, histeria, kaj ŝi rekte iras ĉe la pastron.

SINJORINO LEPIKO, *sufokita.*

Neniam, neniam, mi denove metos piedojn en tiun domon.

SINJORO LEPIKO

Ĝis hodiaŭ vespere !

SINJORINO LEPIKO, *jam sur la strato, per fora voĉo*

Sinjoro Dio, ĉu vi ne fine faligos sur min rigardon de kompato ?

ANNETO

Mi tuj sekvos sinjorinon, ŝi estas tiel konfuza !

SINJORO LEPIKO

Komedio !

Anneto eliras.

SCÈNE IX : POIL DE CAROTTE, MONSIEUR LEPIC

MONSIEUR LEPIC. Il cherche des yeux Poil de Carotte.

Où es-tu ? *Il l'aperçoit dans la grange.* Poltron !

POIL DE CAROTTE

Elle est partie ?

MONSIEUR LEPIC

Tu peux sortir de ta niche.

POIL DE CAROTTE. Il va voir au fond et revient.

Ce qu'elle file ! J'avais la colique. — Allez-vous-en !
Allez-vous-en !

MONSIEUR LEPIC

Je n'ai pas eu à le dire deux fois.

POIL DE CAROTTE

Non, mais tu es terrible.

MONSIEUR LEPIC

Tu trouves ?

POIL DE CAROTTE

Tâte mes mains.

NAŬA SCENO: KAROTKAPO, SINJORO LEPIKO

SINJORO LEPIKO. Li serĉas Karotkapon per okuloj

Kie vi estas? *Li ekvidas lin en la garbejo.* Leporkorulo!

KAROTKAPO

Ĉu ŝi foriris?

SINJORO LEPIKO

Vi povas eliri el via kaŝnesto.

KAROTKAPO. Il iras vidi ĝis la fundo kaj revenas.

Kiel ŝi forkuras! Mi havis kolikon. - Vi foriru !
Vi foriru!

SINJORO LEPIKO

Mi ne bezonis dufoje diri tion.

KAROTKAPO

Ne, sed vi estas terura.

SINJORO LEPIKO

Ĉu vi pensas tion?

KAROTKAPO

Palpu miajn manojn

MONSIEUR LEPIC

Tu trembles !

POIL DE CAROTTE

Je lui paierai ça.

MONSIEUR LEPIC

Tu vois bien que je saurai te protéger.

POIL DE CAROTTE

Oui, quand tu seras là. — Mais qu'est-ce qu'elle a pu te faire pour que tu la rembarres comme ça ? Car tu es juste, papa : si tu ne l'aimes plus, c'est qu'elle t'a fait quelque chose de grave ? Tu as des soucis, je le sens.

MONSIEUR LEPIC

J'ai mon procès.

POIL DE CAROTTE

Oh ! j'avoue qu'il ne m'intéresse guère.

MONSIEUR LEPIC

Ah ! Sais-tu qu'un jour, tu seras peut-être ruiné ?

POIL DE CAROTTE

Confie-moi plutôt tes ennuis... avec elle. — Je suis trop jeune ? — Pas si jeune que tu crois. — J'ai déjà une dent de sagesse qui me pousse.

SINJORO LEPIKO

Vi tremas!

KAROTKAPO

Mi punpagos tion al ŝi.

SINJORO LEPIKO

Vi ja konstatas ke mi scipovos protekti vin.

KAROTKAPO

Jes, kiam vi ĉeestos. Sed kion ŝi do faris al vi, por ke vi forpelis ŝin tiamaniere? Ĉar vi estas justa, paĉjo: se vi ne plu amas ŝin, estas ke, ŝi faris al vi iun gravan malbonon, ĉu ne ? Zorgoj okupas vin, mi sentas tion.

SINJORO LEPIKO

Mi havas mian proceson.

KAROTKAPO

Ho ! Mi konfesas , ke ĝi interesas min tre malmulte.

SINJORO LEPIKO

Ha ! Ĉu vi scias, ke iam vi eble senriĉiĝos ?

KAROTKAPO

Prefere konfidu al mi viajn zorgojn ... pri ŝi. - Ĉu mi estas tro juna ? - Ne tiel juna, kiel vi pensas. - Mi jam havas unu saĝodenton kiu kreskas.

MONSIEUR LEPIC

Et moi, je viens d'en perdre une des miennes, de sorte qu'il n'y a rien de changé, Poil de Carotte, et le nombre des dents de la famille reste le même.

POIL DE CAROTTE

Je t'assure, papa, que je réfléchis pour mon âge. Je lis beaucoup, au collège, des livres défendus que les externes nous prêtent, des romans.

MONSIEUR LEPIC

Des bêtises.

POIL DE CAROTTE

Hé ! hé ! c'est instructif. Veux-tu que je devine, veux-tu que je te pose une question ? au hasard, naturellement. Si tu me trouves trop curieux, tu ne me répondras pas. Je la pose ?

MONSIEUR LEPIC

Pose.

POIL DE CAROTTE

Ma mère aurait-elle commis...

MONSIEUR LEPIC, assis sur le banc.

Un crime ?

SINJORO LEPIKO

Kaj mi, mi ĵus perdis unu el miaj, tiel ke nenio ŝanĝiĝis, Karotkapo, kaj la kvanto da dentoj de la familio restas la sama.

KAROTKAPO

Mi certigas vin, paĉjo, ke mi pripensas malgraŭ mia aĝo. Mi legas multe, en gimnazio, malpermesatajn librojn, kiujn la eksternuloj pruntedonas al ni, romanojn.

SINJORO LEPIKO

Stultaĵojn.

KAROTKAPO

He, he! Tio estas instrua. Ĉu vi deziras, ke mi divenu, ĉu vi deziras, ke mi faru al vi demandon? hazarde, kompreneble. Se vi opinias, ke mi estas tro scivola, vi ne respondos al mi. Ĉu mi demandu?

SINJORO LEPIKO

Demandu.

KAROTKAPO

Ĉu mia patrino kulpus pri...

SINJORO LEPIKO, *sidanta sur la benko.*

Krimo?

POIL DE CAROTTE

Oh ! Non.

MONSIEUR LEPIC

Un péché ?

POIL DE CAROTTE

Ah ! c'en est un.

MONSIEUR LEPIC

Alors ça regarde M. le curé.

POIL DE CAROTTE

Et toi aussi, car ce serait surtout une faute, tu sais bien ? *Il pousse.* Aide-moi donc, papa, une faute... *Il sue.*

MONSIEUR LEPIC

Je ne comprends pas.

POIL DE CAROTTE, d'un coup.

Une grande faute contre la morale, le devoir et l'honneur ?

MONSIEUR LEPIC

Qu'est-ce que tu vas chercher là, Poil de Carotte ?

POIL DE CAROTTE

Je me trompe ?

KAROTKAPO

Ho! Ne.

SINJORO LEPIKO

Peko?

KAROTKAPO

Ha! Tio ja estas.

SINJORO LEPIKO

Do, tio koncernas s-ron la pastro.

KAROTKAPO

Kaj vin ankaŭ, ĉar tio estus precipe malbonago, vi ja scias, ĉu ne? *Li insistas.* Do helpu min, paĉjo, malbonago... *Li ŝvitas.*

SINJORO LEPIKO

Mi ne komprenas.

KAROTKAPO, *subite.*

Grava malbonago kontraŭ moralo, devo kaj honoro?

SINJORO LEPIKO

Kion vi jen imagas, Karotkapo?

KAROTKAPO

Ĉu mi eraras?

MONSIEUR LEPIC

Tu en as de bonnes.

POIL DE CAROTTE

Je n'attache aucune importance à mon idée.

MONSIEUR LEPIC

Rassure-toi, ta mère est une honnête femme.

POIL DE CAROTTE

Ah ! tant mieux pour la famille !

MONSIEUR LEPIC

Et moi aussi, Poil de Carotte, je suis un honnête homme.

POIL DE CAROTTE

Oh ! papa, en ce qui te concerne, je n'ai jamais eu aucun doute.

MONSIEUR LEPIC

Je te remercie...

POIL DE CAROTTE

Et ce ne serait pas la même chose.

MONSIEUR LEPIC

Tu es plus avancé que je ne croyais...

SINJORO LEPIKO

Vi troigas.

KAROTKAPO

Mi ne taksas mian ideon grava.

SINJORO LEPIKO

Trankviliĝu, via patrino estas honesta virino.

KAROTKAPO

Ha! Des pli bone por la familio!

SINJORO LEPIKO

Kaj ankaŭ mi, Karotkapo, mi estas honesta viro.

KAROTKAPO

Ho! Paĉjo, pri vi, mi neniam dubis.

SINJORO LEPIKO

Mi dankas vin...

KAROTKAPO

Kaj ne estus la sama afero.

SINJORO LEPIKO

Vi estas pli matura ol mi pensis...

POIL DE CAROTTE

Mes lectures !... D'après ce que j'ai lu, c'est toujours ça qui trouble un ménage.

MONSIEUR LEPIC

Nous n'avons pas « ça » chez nous.

POIL DE CAROTTE, un doigt sur sa tempe.

Je cherche autre chose.

MONSIEUR LEPIC

Cherche, car l'honnêteté dont tu parles ne suffit pas pour faire bon ménage.

POIL DE CAROTTE

Que faut-il de plus ? Ce qu'on nomme l'amour ?

MONSIEUR LEPIC

Permetts-moi de te dire que tu te sers là d'un mot dont tu ignores le sens.

POIL DE CAROTTE

Évidemment, mais je cherche...

MONSIEUR LEPIC

Rends-toi, va, tu t'égares. Ce qu'il faut dans un ménage, Poil de Carotte, ce qu'il faut surtout, c'est de l'accord, de l'entente...

KAROTKAPO

Miaj legaĵoj ! ... Laŭ tio, kion mi legis, tio estas ĉiam la kaŭzo de malakordoj en geedza paro.

SINJORO LEPIKO

"Tio" en nia hejmo ne estas.

KAROTKAPO, *unu fingro ĉe la tempio.*

Mi serĉas alian aferon.

SINJORO LEPIKO

Serĉu, ĉar la honesto pri kiu vi parolas ne sufiĉas por estigi geedzan akordon.

KAROTKAPO

Kio plia estas bezona? Ĉu estas tio kion oni nomas amo ?

SINJORO LEPIKO

Permesu al mi diri al vi ke vi uzas tie vorton kies sencon vi ne scias.

KAROTKAPO

Kompreneble, sed mi serĉas...

SINJORO LEPIKO

Nu, rezignu, vi misvagis. Kio necesas en paro, Karotkapo, kio cefe necesas estas akordo, kompreno...

POIL DE CAROTTE

De la compatibilité d'humeurs !

MONSIEUR LEPIC

Si tu veux. Or, le caractère de Madame Lepic est l'opposé du mien.

POIL DE CAROTTE

Le fait est que vous ne vous ressemblez guère.

MONSIEUR LEPIC

Ah non ! Je déteste, moi, le bavardage, le désordre, le mensonge, — et les curés.

POIL DE CAROTTE

Et, ça va mal ? — Oh ! parbleu, je m'en doutais, je remarquais des choses... Et il y a longtemps que... vous ne sympathisez pas ?

MONSIEUR LEPIC

Quinze ou seize ans.

POIL DE CAROTTE

Mâtin ! Seize ans ! — l'âge que j'ai.

KAROTKAPO

Humora akordo !

SINJORO LEPIKO

Se vi volas. Tamen, la naturo de sinjorino Lepiko estas la malo de mia.

KAROTKAPO

Fakte, vi ne tre similas unu la alian.

SINJORO LEPIKO

Ha ne ! Mi malamas babiladon, malordon, mensogon, — kaj pastrojn.

KAROTKAPO

Kaj, ĉu tio iras malbone? — Ho ! Per Dio, mi suspektis tion, mi rimarkis aferojn... Kaj ĉu vi ne amikiĝas... de longe?

SINJORO LEPIKO

De dek kvin aŭ dek ses jaroj.

KAROTKAPO

Ha ! De dek ses jaroj ! — mia aĝo.

MONSIEUR LEPIC

En effet, quand tu es né, c'était déjà la fin entre ta mère et moi,

POIL DE CAROTTE

Ma naissance aurait pu vous rapprocher.

MONSIEUR LEPIC

Non. Tu venais trop tard, au milieu de nos dernières querelles. — Nous ne te désirions pas. — Tu me demandes la vérité, je te l'avoue : elle peut servir à t'expliquer ta mère.

POIL DE CAROTTE

Il ne s'agit pas de moi... Je voulais dire qu'à l'occasion, au moindre prétexte, des époux se raccommoient.

MONSIEUR LEPIC

Une fois, deux fois, dix fois, pas toujours.

POIL DE CAROTTE

Mais une dernière fois... ?

MONSIEUR LEPIC

Oh ! je ne bouge plus !

SINJORO LEPIKO

Fakte, kiam vi naskiĝis, tio jam estis la fino inter via patrino kaj mi.

KAROTKAPO

Mia nasko tiam povus proksimigi vin reciproke.

SINJORO LEPIKO

Ne. Vi alvenis tro malfrue, dum niaj lastaj kvereloj. — Ni ne deziris vin. — Vi postulas de mi la veron, mi konfesas ĝin al vi: ĝi eble utilas por klarigi al vi vian patrinon.

KAROTKAPO

Ne temas pri mi... Mi volis diri, ke je okazo, je la plej malgranda preteksto, geedzoj reamikiĝas.

SINJORO LEPIKO

Unufoje, dufoje, dekfoje, ne ĉiufoje.

KAROTKAPO

Sed unu lastan fojon... ĉu ne ?

SINJORO LEPIKO

Ho ! Mi ne plu moviĝas !

POIL DE CAROTTE, un pied sur le banc.

Comment, papa, toi, un observateur, t'es-tu marié avec maman ?

MONSIEUR LEPIC

Est-ce que je savais ? Il faut des années, Poil de Carotte, pour connaître une femme, sa femme, et quand on la connaît, il n'y a plus de remède.

POIL DE CAROTTE

Et le divorce ? À quoi sert-il ?

MONSIEUR LEPIC

Impossible. Sans ça... oui, écorché par cette existence stupide, j'ai fait des propositions. Elle a refusé.

POIL DE CAROTTE

Toujours la même !

MONSIEUR LEPIC

C'était son droit. Je n'ai à lui reprocher, comme toi d'ailleurs, que d'être insupportable. Cela suffit peut-être pour que tu la quittes. Cela ne suffit pas pour que je me délivre.

POIL DE CAROTTE. Il s'assied près de M. Lepic.

En somme, papa, tu es malheureux ?

KAROTKAPO, unu piedo surbanke.

Kiel, paĉjo, vi, observema kiel vi estas, vi edziĝis kun panjo ?

SINJORO LEPIKO

Ĉu mi sciis ? Necesas jaroj, Karoto-Kapo, por koni virinon, sian edzinon, kaj kiam oni konas ŝin, jam ne plu estas rimedo.

KAROTKAPO

Kaj la divorco ? Por kio ĝi utilas ?

SINJORO LEPIKO

Ne eblas. Sen tio... jes, naŭzita de tia stulta vivo, mi faris proponojn. Ŝi rifuzis.

KAROTKAPO

Ĉiam la sama!

SINJORO LEPIKO

Ŝi rajtis. Mi nur riproĉas al ŝi, cetere kiel vi, ke ŝi estas neeltenebla. Tio eble sufiĉas por ke vi forlasu ŝin. Tio ne sufiĉas por ke mi liberigu min.

KAROTKAPO. *Li sidiĝas apud s-o Lepiko.*

Resume, paĉjo, vi estas malfeliĉa, ĉu ne ?

MONSIEUR LEPIC

Dame !

POIL DE CAROTTE

Presque aussi malheureux que moi ?

MONSIEUR LEPIC

Si ça peut te consoler.

POIL DE CAROTTE

Ça me console jusqu'à un certain point. Ça m'indigne surtout. Moi, passe ! je ne suis que son enfant, mais toi, le père, toi, le maître, c'est insensé, ça me révolte, *il se lève, montre le poing à la fenêtre. Ah ! mauvaise, mauvaise ! tu mériterais...*

MONSIEUR LEPIC

Poil de Carotte !

POIL DE CAROTTE

Oh ! elle est sortie.

MONSIEUR LEPIC

Ce geste !

POIL DE CAROTTE

Je suis exaspéré, à cause de toi... Quelle femme !

SINJORO LEPIKO

Ho ve!

KAROTKAPO

Preskaŭ same malfeliĉa kiel mi, ĉu ne ?

SINJORO-LEPIKO

Jes, se tio povas konsoli vin.

KAROTKAPO

Tio konsolas min, sed ne tute. Tio ĉefe indignigas min. Koncerne min, ne gravas ! Mi estas nur ŝia infano, sed vi, la patro, vi, la mastro, tio estas freneza, tio ege kolerigas min. *Li leviĝas, montras la pugnnon al la fenestro. Ha! Malbona, malbona! Vi meritus ...*

SINJORO LEPIKO

Karotkapo!

KAROTKAPO

Ho! Ŝi estas fore.

SINJORO LEPIKO

Tiu gesto !

KAROTKAPO

Pro vi, mi ege incitiĝas... Kia virino !

MONSIEUR LEPIC. Il se lève.

C'est ta mère.

POIL DE CAROTTE

Oh ! je ne dis pas ça parce que c'est ma mère. Oui, sans doute. Et après ? Ou elle m'aime ou elle ne m'aime pas. Et puisqu'elle ne m'aime pas, qu'est-ce que ça me fait qu'elle soit ma mère ? Qu'importe qu'elle ait le titre, si elle n'a pas les sentiments ? Une mère, c'est une bonne maman, un père, c'est un bon papa. Sinon, ce n'est rien.

MONSIEUR LEPIC, piqué, se lève.

Tu as raison.

POIL DE CAROTTE

Ainsi, toi, par exemple, je ne t'aime pas parce que tu es mon père. Nous savons que ce n'est pas sorcier d'être le père de quelqu'un. Je t'aime parce que...

MONSIEUR LEPIC

Pourquoi ? tu ne trouves pas.

POIL DE CAROTTE

... Parce que... nous causons là, ce soir, tous deux, intimement, parce que tu m'écoutes et que tu veux bien me répondre, au lieu de m'accabler de ta puissance paternelle.

SINJORO LEPIKO. *Li stariĝas.*

Ŝi estas via patrino.

KAROTKAPO

Ho ! Mi ne diras tion ĉar ŝi estas mia patrino. Jes, sendube. Kaj plie ? Ĉu ŝi amas min, ĉu ŝi ne amas min. Kaj ĉar ŝi ne amas min, do kio gravas al mi, ke ŝi estas mia patrino ? Tute egale estas, ke ŝi havas la titolon, se la sentoj mankas al ŝi ? Patrino estas bona panjo, patro, estas bona paĉjo. Krom tio, restas nenio.

SINJORO LEPIKO, *instigita, stariĝas.*

Vi estas prava.

KAROTKAPO

Nu, ekzemple, vin mi ne amas ĉar vi estas mia patro. Ni scias ke ne necesas multe da scienco por esti la patro de iu. Mi amas vin ĉar...

SINJORO LEPIKO

Kial ? Vi ne trovas.

KAROTKAPO

... Ĉar... Ni babilas tie, hodiaŭ vespere, ambaŭ, intime, ĉar vi aŭskultas min kaj, ĉar vi volonte respondas al mi, anstataŭ aflikti min per via patra potenco.

MONSIEUR LEPIC

Pour ce qu'elle me rapporte !

POIL DE CAROTTE

Et la famille, papa ? quelle blague !... quelle drôle d'invention !

MONSIEUR LEPIC

Elle n'est pas de moi.

POIL DE CAROTTE

Sais-tu comment je la définis, la famille ? une réunion forcée... sous le même toit... de quelques personnes qui ne peuvent pas se sentir.

MONSIEUR LEPIC

Ce n'est peut-être pas vrai de toutes les familles, mais il y a, dans l'espèce humaine, plus de quatre familles comme la nôtre, sans compter celles qui ne s'en vantent pas.

POIL DE CAROTTE

Et tu es mal tombé.

MONSIEUR LEPIC

Toi aussi.

SINJORO LEPIKO

Vidu, kion mi gajnas per ĝi!

KAROTKAPO

Kaj la familio, paĉjo? Kia mistifiko!... Kia stranga inventaĵo!

SINJORO LEPIKO

Ĝi ne estas de mi.

KAROTKAPO

La familion ĉu vi scias kiel mi difinas ? Deviga kunestado... sub la sama tegmento... de kelkaj personoj kiuj ne povas toleri unu la alian.

SINJORO LEPIKO

Eble tio ne estas vera por ĉiuj familioj, sed estas, en la homa specio, pli ol kvar familioj similaj al la nia, sen nombri tiujn kiuj ne fanfaronas.

KAROTKAPO

Kaj vi estas malbonŝanca.

SINJORO LEPIKO

Vi ankaŭ.

POIL DE CAROTTE

Notre famille, ce devrait être, à notre choix, ceux que nous aimons et qui nous aiment.

MONSIEUR LEPIC

Le difficile est de les trouver... Tâche d'avoir cette chance plus tard. Sois l'ami de tes enfants. J'avoue que je n'ai pas su être le tien.

POIL DE CAROTTE

Je ne t'en veux pas.

MONSIEUR LEPIC

Tu le pourrais.

POIL DE CAROTTE

Nous nous connaissions si peu.

MONSIEUR LEPIC, comme s'il s'excusait.

C'est vrai que je t'ai à peine vu. D'abord ta mère t'a mis tout de suite en nourrice.

POIL DE CAROTTE

Elle a du m'y laisser un moment.

MONSIEUR LEPIC

Quand tu es revenu, on t'a prêté quelques années à ton parrain qui n'avait pas d'enfant.

KAROTKAPO

Nia familio devus inkludi, laŭ nia elekto, tiujn, kiujn ni amas kaj kiuj nin amas.

SINJORO LEPIKO

Trovi ilin estas malfacila... Klopodu por esti tiel bonŝanca pli poste. Estu la amiko de viaj infanoj. Mi konfesas ke mi ne sukcesis esti la via.

KAROTKAPO

Mi ne riproĉas tion al vi.

SINJORO LEPIKO

Vi povus.

KAROTKAPO

Ni konis nin tiel malmulte.

SINJORO LEPIKO, *kvazaŭ pardonpetante.*

Verdire mi apenaŭ vidis vin. Komence via patrino tuj konfidis vin al vartistino.

KAROTKAPO

Ŝi probable forlasis min tie dum longa momento.

SINJORO LEPIKO

Kiam vi revenis, oni pruntedonis vin dum kelkaj jaroj al via baptopatro, kiu ne havis infanon.

POIL DE CAROTTE

Je me rappelle qu'il m'embrassait trop et qu'il me piquait avec sa barbe.

MONSIEUR LEPIC

Il raffolait de toi.

POIL DE CAROTTE

Un parrain n'est pas un papa.

MONSIEUR LEPIC

Ah ! tu vois bien !... Puis tu es entré au collège où tu passes ta vie, — comme tous les enfants, —. excepté les deux mois de vacances que tu passes à la maison. Voilà.

POIL DE CAROTTE

Tu ne m'as jamais tant vu qu'aujourd'hui ?...

MONSIEUR LEPIC

C'est ma faute sans doute ; c'est celle des circonstances, c'est aussi un peu la tienne, tu te tenais à l'écart, fermé, sauvage. On s'explique...

POIL DE CAROTTE

Il faut pouvoir.

KAROTKAPO

Mi memoras ke li tro kisis min kaj ke li pikis min per sia barbo.

SINJORO LEPIKO

Li amis vin freneze.

KAROTKAPO

Baptopatro ne estas patro.

SINJORO LEPIKO

Ha ! Vi konsentas !... Poste vi eklemis en la kolegio, kie vi pasigas vian tutan tempon, — kiel ĉiuj infanoj, —. krom la du feriomonatoj, kiujn vi pasigas hejme. Tiel estas.

KAROTKAPO

Vi neniam vidis min tiom, kiom hodiaŭ, ĉu ne ?

SINJORO LEPIKO

Mi sendube kulpas; la cirkonstancoj kulpas kaj vi ankaŭ iom kulpas ĉar vi apartiĝis, fermita, sovaĝa. Oni interparolas...

KAROTKAPO

Necesas povi.

MONSIEUR LEPIC

Même à la chasse, tu ne dis rien.

POIL DE CAROTTE

Toi non plus. Tu vas devant, je suis derrière, à distance, pour ne pas gêner ton tir, et tu marches, tu marches...

MONSIEUR LEPIC

Oui, je n'ai de goût qu'à la chasse.

POIL DE CAROTTE

Et si tu te figures que c'est commode de s'épancher avec toi ! au premier mot tu sourcilles. — Oh ! cet œil ! — et tu deviens sarcastique.

MONSIEUR LEPIC

Que veux-tu ? Je ne devinai pas tes bons mouvements. Absorbé par mon diable de procès, fuyant cet intérieur, je ne te voyais pas... Je te méconnaissais. Nous nous rattraperons. — Une cigarette ?

POIL DE CAROTTE

Non, merci. — Est-ce que je gagne à être connu, papa ?

MONSIEUR LEPIC

Beaucoup. — Parbleu, je te savais intelligent... Fichtre non, tu n'es pas bête.

SINJORO LEPIKO

Eĉ dum ĉaso, vi diras nenion.

KAROTKAPO

Ankaŭ ne vi. Vi iras antaŭe, mi sekvas poste, ne tro proksime, por ne ĝeni vian pafon, kaj vi marŝas, vi marŝas...

SINJORO LEPIKO

Jes, nur ĉasado plaĉas al mi.

KAROTKAPO

Kaj se vi imagas ke estas facila sin konfidi al vi ! Ekde la unua vorto vi sulkigas la brovojn. — Ho ! Kia okulo ! — kaj vi eksarkasmas.

SINJORO LEPIKO

Tiel estas ! Mi ne divenis viajn bonajn impetojn. Tute okupita de mia diabla proceso, fuĝante el tiu hejmo, mi ne vidis vin... Mi miskonis vin. Ni kompensos. — Cigaredon ?

KAROTKAPO

Ne dankon. — Ĉu mi plivaloras, se oni konas min, paĉjo ?

SINJORO LEPIKO

Multe. — Per Dio, mi sciis, ke vi estas inteligenta... Certe ne, vi ne estas stulta.

POIL DE CAROTTE

Si ma mère m'avait aimé, j'aurais peut-être fait quelque chose.

MONSIEUR LEPIC

Au contraire, Poil de Carotte. Les enfants gâtés ne font rien.

POIL DE CAROTTE

Ah !... Et tu me croyais intelligent mais égoïste, vilain au moral comme au physique.

MONSIEUR LEPIC

D'abord, tu n'es pas laid.

POIL DE CAROTTE

Elle ne cesse de répéter...

MONSIEUR LEPIC

Elle exagère.

POIL DE CAROTTE

Mon professeur de dessin prétend que je suis beau.

MONSIEUR LEPIC

Il exagère aussi.

KAROTKAPO

Se mia patrino jam amus min, mi eble farus ion.

SINJORO LEPIKO

Male, Karotkapo. Trodorlotitaj infanoj faras nenion.

KAROTKAPO

Ha !... Kaj vi pensis ke mi estas inteligenta sed egoisma, fia tiel morale kiel fizike.

SINJORO LEPIKO

Unue, vi ne aspektas fia.

KAROTKAPO

Ŝi senĉese rediradas...

SINJORO LEPIKO

Ŝi troigas.

KAROTKAPO

Mia desegno-instruisto pretendas, ke mi estas bela.

SINJORO LEPIKO

Ankaŭ li troigas.

POIL DE CAROTTE

Il se place au point de vue pittoresque. Ça me fait plaisir que tu ne me trouves pas trop laid.

MONSIEUR LEPIC

Et quand tu serais encore plus laid ? Pourvu qu'un homme ait la santé !

POIL DE CAROTTE

Oh ! je me porte bien... Et au moral, papa, est-ce que tu me crois menteur, sans cœur, boudeur, paresseux ?

MONSIEUR LEPIC

Arrête, arrête... Je ne sache pas que tu mentes.

POIL DE CAROTTE

Si, quelquefois, pour lui obéir.

MONSIEUR LEPIC

Alors ça ne compte pas.

POIL DE CAROTTE

Et me crois-tu le cœur sec ?

MONSIEUR LEPIC

Ça ne veut rien dire. Moi aussi, j'ai le cœur sec. On

KAROTKAPO

Li staras el vidpunkto de pentrindeco. Plezurigas min ke vi ne trovas min tro malbela.

SINJORO LEPIKO

Kaj eĉ se vi estus ankoraŭ pli malbela ? Nur gravas ke homo bonfartu !

KAROTKAPO

Ho! Mi bone fartas... Kaj morale, paĉjo, ĉu vi kredas min mensogema, senkora, paŭtema, mallaborema ?

SINJORO LEPIKO

Haltu, haltu... Miascie, vi ne mensogas.

KAROTKAPO

Jes ja, kelkfoje, por obei al ŝi.

SINJORO LEPIKO

Nu, tio ne estas konsiderinda.

KAROTKAPO

Kaj, ĉu vi taksas mian koron seka?

SINJORO LEPIKO

Tio nenion signifas. Ankaŭ mi havas sekan koron.

nous accuse d'avoir le cœur sec parce que nous ne pleurons pas... Tu serais tout au plus un petit peu boudeur.

POIL DE CAROTTE

Je te demande pardon, papa, je ne boude jamais.

MONSIEUR LEPIC

Qu'est-ce que tu fais dans tes coins ?

POIL DE CAROTTE

Je rage, et ça ne m'amuse pas, contre une mère injuste.

MONSIEUR LEPIC

Et moi qui t'aurais cru plutôt de son côté !

POIL DE CAROTTE

C'est un comble !

MONSIEUR LEPIC

C'est naturel. La preuve, quand ta mère te demandait, car elle avait cet aplomb : « Lequel aimes-tu mieux, ton papa ou ta maman ? » Tu répondais :...

POIL DE CAROTTE

« Je vous aime autant l'un que l'autre. »

Oni akuzas nin havi koron seka ĉar ni ne ploras... Maksimume, vi estus iomete paŭtema.

KAROTKAPO

Mi petas vian pardonon, paĉjo, mi neniam paŭtas.

SINJORO LEPIKO

Kion vi faras aparte retirita?

KAROTKAPO

Mi koleras, kaj tio ne amuzas min, kontraŭ maljusta patrino.

SINJORO LEPIKO

Kaj mi, kiu pensis, ke vi prefere substenus ŝin !

KAROTKAPO

Tio estas plejsupro !

SINJORO LEPIKO

Tio estas memkomprenebla. La pruvo, kiam via patrino, demandis al vi, ĉar ŝi aplombe aŭdacis : "Kiun vi amas pleje, vian paĉjon aŭ vian panjon ?" Vi respondis ...

KAROTKAPO

"Mi amas vin ambaŭ same multe"

MONSIEUR LEPIC

Ta mère insistait : « Poil de Carotte, tu as une petite préférence pour l'un des deux ». Et tu finissais par répondre : « Oui. J'ai une petite préférence... »

POIL DE CAROTTE

« Pour maman. »

MONSIEUR LEPIC

Pour maman, jamais pour papa. Tu m'agaçais avec ta petite préférence. Tu avais beau ne pas savoir ce que tu disais...

POIL DE CAROTTE

Oh! que si... Je disais ce qu'elle me faisait dire : entre elle et moi, c'était convenu d'avance.

MONSIEUR LEPIC

C'est bien elle !

POIL DE CAROTTE

Et elle veut à présent que je dise : mon père, au lieu de : mon papa. Mais sois tranquille !

MONSIEUR LEPIC, attendri.

Ah ! cher petit !... Comment aurais-je pu te savoir plein de qualités, raisonnable, affectueux, très gentil, tel que tu es, mon cher petit François !

SINJORO LEPIKO

Via patrino insistis : « Karotkapo, vi iomete preferas unu el la du ». Kaj vi respondis fine : « Jes, mi iomete preferas... »

KAROTKAPO

« Patrino. »

SINJORO LEPIKO

Patrino, neniam patron. Vi incitis min per via eta prefero. Kvankam vi ne sciis, kion vi diris...

KAROTKAPO

Ho ! Jes ja... Mi diris tion, kion ŝi devigis min diri : ni antaŭe interkonsentis.

SINJORO LEPIKO

Mi bone rekonas ŝin !

KAROTKAPO

Kaj nun ŝi volas, ke mi diru mia patro anstataŭ mia paĉjo. Sed trankviliĝu !

SINJORO LEPIKO, *kortuŝita*.

Ha ! Kara knabo !... Kiel mi jam povus scii ke vi estas plena de virtoj, konsiderema, korinklina, tre afabla, tiel, kiel vi estas, kara Francisko mia!

POIL DE CAROTTE, étonné, ravi.

François ! Tiens ! Tu m'appelles par mon vrai nom.

MONSIEUR LEPIC

Je devais te froisser, en te donnant l'autre ?

POIL DE CAROTTE

Oh ! pas toi. C'est le ton qui fait tout. *Avec pudeur*. Tu m'aimes ?

MONSIEUR LEPIC

Comme un enfant... retrouvé. *Il serre Poil de Carotte contre lui, légèrement, sans l'embrasser.*

POIL DE CAROTTE. Il se dégage un peu.

Si elle nous voyait !

MONSIEUR LEPIC

Ah ! je n'ai pas eu de chance. Je me suis trompé sur ta nature, comme je m'étais trompé sur celle de ta mère.

POIL DE CAROTTE

Oui, mais à rebours.

MONSIEUR LEPIC

Et ça compense.

KAROTKAPO, *mirigita, rava*.

Francisko ! Ha ! Vi nomas min per mia vera nomo.

SINJORO LEPIKO

Certe mi ofendis vin, uzante la alian, ĉu ne ?

KAROTKAPO

Ho ! Ne vi. La tono estas tio, kio gravas. *Pudore*. Ĉu vi amas min ?

SINJORO LEPIKO

Kiel... retrovitan infanon. *Li brakumas Karotkapon, delikate, sen kisi lin.*

KAROTKAPO. *Li iomete liberiĝas.*

Se ŝi vidus nin !

SINJORO LEPIKO

Ha ! Mi ne havis bonan ŝancon. Mi eraris min pri via naturo, same mi jam eraris min pri tiu de via patrino.

KAROTKAPO

Jes, sed inverse.

SINJORO LEPIKO

Kaj tio kompensas.

POIL DE CAROTTE

Oh ! non, papa... Je te plains sincèrement. Moi, j'ai l'avenir pour me créer une autre famille, refaire mon existence, et toi, tu achèveras la tienne, tu passeras toute ta vieillesse auprès d'une personne qui ne se plaît qu'à rendre les autres malheureux.

MONSIEUR LEPIC sans regret.

Et elle n'est pas heureuse non plus.

POIL DE CAROTTE

Comment, elle n'est pas heureuse ?

MONSIEUR LEPIC

Ce serait trop facile !

POIL DE CAROTTE, badin.

Elle n'est pas heureuse de me donner des gifles ?

MONSIEUR LEPIC

Si, si. — Mais elle n'a guère, avec toi, que ce bonheur.

POIL DE CAROTTE

C'est tout ce que je peux lui offrir. Que voudrait-elle de plus ?

KAROTKAPO

Ho, ne, paĉjo. Mi sincere kompatas vin. Mi havas la estontecon por krei al mi alian familion, rekonstrui mian ekzistadon sed vi, vi elfaros vian, vi okupos vian tutan maljunecon apud persono, kiu nur plezuras igi aliajn personojn malfeliĉaj.

SINJORO LEPIKO *senbedaŭre*

Ŝi ankaŭ ne estas feliĉa.

KAROTKAPO

Kion vi diras, ĉu ŝi ne estas feliĉa?

SINJORO LEPIKO

Tio estus tro facila!

KAROTKAPO, *petolema*

Ŝi ne estas feliĉa vangofrapi min, ĉu ne?

SINJORO LEPIKO

Jes, ja – Sed ŝi havas kun vi nur tiun feliĉon.

KAROTKAPO

Tio estas ĉio, kion mi povas donaci al ŝi. Kion plian ŝi volus ?

MONSIEUR LEPIC, grave

Ton affection.

POIL DE CAROTTE

Mon affection !... La tienne, je ne dis pas...

MONSIEUR LEPIC

Oh ! la mienne... Elle y a renoncé... La tienne seulement.

POIL DE CAROTTE'

Mon affection manque à ma mère ! Je ne comprends plus rien à la vie...

MONSIEUR LEPIC

Ça t'étonne qu'on souffre de ne pas savoir se faire aimer ?

POIL DE CAROTTE

Et tu crois qu'elle en souffre ?

MONSIEUR LEPIC

J'en suis sûr.

POIL DE CAROTTE

Qu'elle est malheureuse ?

MONSIEUR LEPIC

Elle l'est.

SINJORO LEPIKO, seriozega

Vian korinklinon.

KAROTKAPO

Mian korinklinon !... La vian, eble...

SINJORO LEPIKO

Ho! La mian Ŝi rezignis pri ĝi... Nur la vian.

KAROTKAPO

Mia korinklino mankas al mia patrino! Mi komprenas nenion plu al la vivo ...

SINJORO LEPIKO

Ĉu mirigas vin, ke oni suferas ne scii kiel sin amigi?

KAROTKAPO

Kaj ĉu vi pensas, ke ŝi suferas pro tio ?

SINJORO LEPIKO

Mi certas pri tio.

KAROTKAPO

Ke ŝi estas malfeliĉa ?

SINJORO LEPIKO

Ŝi estas tia.

POIL DE CAROTTE

Malheureuse, — comme toi ?

MONSIEUR LEPIC

Au fond, ça se vaut.

POIL DE CAROTTE

Comme moi ?

MONSIEUR LEPIC

Oh ! personne n'a cette prétention.

POIL DE CAROTTE

Papa, tu me confonds. Voilà une pensée qui ne m'était jamais venue à l'esprit.

Il s'assied et cache sa tête dans ses mains.

MONSIEUR LEPIC, avec effort.

Et nous sommes là à gémir. Il faudrait l'entendre. Peut-être qu'elle aussi trouve qu'elle est mal tombée. Qui sait si avec un autre ?... N'obtenant pas d'elle ce que je voulais, j'ai été rancunier, impitoyable, et mes duretés pour elle, elle te les a rendues. Elle a tous les torts envers toi, mais envers moi, les a-t-elle tous ? Il y a des moments où je m'interroge... — Et quand je m'interrogerais, jusqu'à demain. À quoi bon ? C'est trop tard, c'est fini, et puis en voilà assez... Allons à la

KAROTKAPO

Malfeliĉa, — kiel vi ?

SINJORO LEPIKO

Finfine, tio valoras same.

KAROTKAPO

Kiel mi ?

SINJORO LEPIKO

Ho ! Neniu pretendas tion.

KAROTKAPO

Paĉjo, vi konfuzas min. Jen penso kiu neniam atingis mian cerbon.

Li sidiĝas kaj kaŝas sian kapon en siajn manojn.

SINJORO LEPIKO, *strebante*

Kaj ni estas tie ĝemante. Necesus aŭdi ŝin. Eble ŝi ankaŭ pensas ke ŝi malbonŝancas. Kiu scias, ĉu kun iu ajn alia?... Ne atinginte kion mi deziris de ŝi, mi estis nepardonema, malkompatema, kaj miajn malteneraĵojn kontraŭ ŝi, ŝi transdonis al vi. Pri vi, ŝi tute malpravas, sed pri mi, ĉu ŝi tute malpravas ? Kelkfoje mi pridemandas min... — Kaj eĉ se mi pridemandus min ĝis morgaŭ. Ve ! Tro malfruas, estas finita, kaj jen sufiĉas...

chasse une heure ou deux, ça nous fera du bien.
Il découvre la tête de de Poil de Carotte. Pourquoi pleures-tu ?

POIL DE CAROTTE, la figure ruisselante.

C'est ton idée : Ma mère malheureuse, parce que je ne l'aime pas.

MONSIEUR LEPIC, amer.

Puisque ça te désole tant. tu n'as qu'à l'aimer.

POIL DE CAROTTE, se redressant.

Moi !

SCÈNE X : LES MÊMES, ANNETTE.

ANNETTE, accourant.

Monsieur, madame peut-elle rentrer ?

Poil de Carotte s'essuie rapidement les yeux.

MONSIEUR LEPIC, redevenu Monsieur Lepic.

Elle me demande la permission ?

ANNETTE

Non, monsieur. C'est moi qui viens devant, pour voir si vous êtes toujours fâché.

Ni iru ĉasi unu horon aŭ du, tio bonefikos al ni. *Li malkovras la kapon de Karotkapo.* Kial vi ploras ?

KAROTKAPO, *larmoj fluas sur sia vizaĝo.*

Pro via ideo : mia patrino malfeliĉa, ĉar mi ne amas ŝin.

SINJORO LEPIKO, *amara.*

Se tio tiel afliktas vin, do amu ŝin.

KAROTKAPO, *ekstarante.*

Mi !

DEKA SCENO: LA SAMAJ, ANNETO.

ANNETO, *alkurante.*

Sinjoro, ĉu Sinjorino povas rehejmiĝi?

Karotkapo rapide sekigas siajn okulojn.

SINJORO LEPIKO, *denove kiel Sinjoro Lepiko.*

Ĉu ŝi petas mian permeson?

ANNETO

Ne, Sinjoro. Nur mi antaŭvenas por vidi ĉu vi ankoraŭ koleras.

MONSIEUR LEPIC

Je ne me fâche jamais. Qu'elle rentre si elle veut :
la maison lui appartient comme à moi.

ANNETTE

Elle était allée à l'église.

MONSIEUR LEPIC

Chez le curé.

ANNETTE

Non, à l'église. Elle a versé un plein bénitier de
larmes, elle a bien du chagrin. — Oh ! si, monsieur...
La voilà !...

*M. Lepic tourne le dos à la porte ; Mme Lepic parait,
les yeux baissés, l'air abattu.*

POIL DE CAROTTE

Maman !... maman !

*Mme Lepic s'arrête et regarde Poil de Carotte ; elle
semble lui dire de parler.*

POIL DE CAROTTE, son élan perdu.

Rien.

*Mme Lepic passe et rentre à la maison. Annette sort
par la porte de la cour.*

SINJORO LEPIKO

Mi neniam koleras. Ŝi rehejmiĝu, se ŝi volas:
la domo apartenas al ŝi kiel al mi.

ANNETO

Ŝi iris al la preĝejo.

SINJORO LEPIKO

Ĉe la pastron.

ANNETO

Ne, al la preĝejo. Ŝi plenigis tutan sanktakvuĵon per larmoj,
ŝi ja malĝojegas. — Jes ja, Sinjoro...
Jen ŝi alvenas!...

*Sinjoro Lepiko staras dorse al la pordo ; Sinjorino Lepiko aperas,
malsupren rigardanta, malvigle aspektanta.*

KAROTKAPO

Panjo!... panjo !

*Sinjorino Lepiko haltas kaj rigardas Karotkapon ; ŝi
ŝajnas inviti lin paroli.*

KAROTKAPO, perdinte sian impeton.

Nenio.

*Sinjorino Lepiko preterpasas kaj eniras la domon. Anneto eliras
tra la pordo de la korto.*

SCÈNE XI : POIL DE CAROTTE, MONSIEUR LEPIC

MONSIEUR LEPIC

Que lui voulais-tu ?

POIL DE CAROTTE

Oh ! ce n'est pas la peine.

MONSIEUR LEPIC

Elle te fait toujours peur ?

POIL DE CAROTTE

Oui. — Moins ! — As-tu remarqué ses yeux ?

MONSIEUR LEPIC

Qu'est-ce qu'ils avaient de neuf ?

POIL DE CAROTTE

Ils ne lançaient pas des éclairs comme d'habitude.
Ils étaient tristes, tristes ! Tu ne t'y laisses plus prendre,
toi ? *Silence de M. Lepic*. Pauvre papa !... Pauvre maman ! —
Il n'y a que Félix. Il pêche, lui, là-bas, au moulin...
Dire que c'est mon frère ! Qui sait s'il me regrettera ?

MONSIEUR LEPIC

Tu veux toujours partir ?

SCENO DEK UNUA : KAROTKAPO, SINJORO LEPIKO.

SINJORO LEPIKO

Kion vi volis de ŝi ?

KAROTKAPO

Ho! Ne gravas.

SINJORO LEPIKO

Ĉu ŝi ankoraŭ timigas vin ?

KAROTKAPO

Jes. – Malpli ! – Ĉu vi rimarkis ŝiajn okulojn?

SINJORO LEPIKO

Kio estis nova en ili ?

KAROTKAPO

Ili ne fulmis kiel kutime. Ili estis malĝojaj, malĝojaj! Tio ja ne plu
trompas vin, ĉu ne? *Silenco de S-ro Lepiko*. Kompatinda paĉjo!...
Kompatinda panjo! – Restas Felikso. Li fiŝkaptas, ja, tie for,
ĉe la muelejo... Tamen li estas mia frato! Kiu scias ĉu li bedaŭros min ?

SINJORO LEPIKO

Ĉu vi ankoraŭ deziras foriri ?

POIL DE CAROTTE

Tu ne me le conseilles pas ?

MONSIEUR LEPIC

Après ce que nous venons de dire ?

POIL DE CAROTTE

Oh ! papa, quelle bonne causerie !

MONSIEUR LEPIC

Il y a seize ans que je n'en avais tant dit, et je ne te promets pas de recommencer tous les jours.

POIL DE CAROTTE

Je regrette. — Mais si je reste, quelle attitude faudra-t-il que j'aie avec ma mère ?

MONSIEUR LEPIC

La plus simple, la mienne.

POIL DE CAROTTE

Celle d'un homme.

MONSIEUR LEPIC

Tu en es un.

KAROTKAPO

Ĉu vi ne konsilas tion al mi ?

SINJORO LEPIKO

Post tio kion ni ĵus diris, ĉu ?

KAROTKAPO

Oh! Paĉjo, kia bona interparolado!

SINJORO LEPIKO

De dek ses jaroj mi ne diris tiom multe, kaj mi ne promesas al vi fari tiel ĉiutage.

KAROTKAPO

Mi bedaŭras. – Sed se mi restas, kian sintenon mi devos adopti fronte al mia patrino?

SINJORO LEPIKO

La plej simplan, la mian.

KAROTKAPO

Tiun de viro.

SINJORO LEPIKO

Viro vi ja estas.

POIL DE CAROTTE

Si elle me demande qui m'a donné l'ordre d'avoir cette attitude, je dirai que c'est toi.

MONSIEUR LEPIC

Dis.

POIL DE CAROTTE

Dans ces conditions, ça marcherait peut-être.

MONSIEUR LEPIC

Tu hésites ?

POIL DE CAROTTE

Je réfléchis, ça en vaut la peine.

MONSIEUR LEPIC

Tu es long. *Par habitude* : Poil de Carotte... François.

POIL DE CAROTTE

Tu t'ennuierais seul, hein ? Tu ne pourrais plus vivre sans moi. *M. Lepic se garde de répondre*. Eh bien, oui, mon vieux papa, c'est décidé, je ne t'abandonne pas, je reste.

RIDEAU

KAROTKAPO

Se ŝi demandos al mi kiu ordonis al mi tiun sintenon, mi diros ke vi ordonis.

SINJORO LEPIKO

Diru.

KAROTKAPO

Pro tiuj kondiĉoj eble tio funkcius.

SINJORO LEPIKO

Vi hezitas, ĉu ne?

KAROTKAPO

Mi pripensas, indas pripensi.

SINJORO LEPIKO

Vi longe pripensas. *Pro kutimo* : Karotkapo... Francisko.

KAROTKAPO

Sola, vi enuus, ĉu ne ? Vi ne plu povus vivi sen mi. *Sinjoro Lepiko sin detenas de respondo*. Do, jes ja, mia kara paĉjo, mi decidis, mi ne forlasas vin, mi restas.

FINO